

ZLATKO TIŠLJAR

EKZISTADO

KIBERNETIKA KLARIGO
DE LA MONDO



Kopirajto © Zlatko Tišljar, 2012.

Eldonis
IZVORI
Zagrebo

Redaktoro
Damir Mikuličić

Lektoro
d-ro Toon Witkam

Enpaĝigo
Stanislav Vidmar

ISBN 978-953-203-385-4

Originale verkita en Esperanto

Presita en Kroatio

Zagrebo, 2012.

Zlatko Tišljar

EKZISTADO

KIBERNETIKA KLARIGO DE LA MONDO

*Kun kora dediĉo al d-ro Rüdiger Sachs, kiu
daŭre stimulis min fini la verkon.*

1

PRI KIBERNETIKAJ PRINCIPOJ KAJ METODOJ KAJ PRI LINGVISTIKO

Pro la ekzisto de tempo ne estas ebla neŝanĝeblo. Ĉio ekzistas en tempo, do ĉio daŭre ŝanĝiĝas kaj influas al ŝanĝoj ĉirkaŭ si. Pro tio difini kion ajn per stato (sen faktoroj kiuj influas ĝian daŭran ŝanĝiĝadon, moviĝadon kaj transformiĝadon) estas mankohava kaj nekompleta. Diri ke iu estas egoisto kaj alia altruisto, iu saĝa kaj alia malsaĝa, ke iu estas kroato kaj alia franco estas same malĝusta kiel diri ke iu estas kaj restas bela. La staton oni povas observi nur sur bildo, kiu haltigis la tempon. Iu estas franco laŭ ŝtataneco en sia tuta vivo, sed tamen li estas ankaŭ alzacano, strasburgano, membro de sia familio, katoliko, membro de sia labor kolegaro, de iu politika partio... Foje li sentas siajn aliajn apartenojn pli forte ol sian francecon kaj foje inverse, foje li malamas, ke li estas franco... Pro tio oni povas difini ĉion nur kiel procesojn en tempo kun faktoroj kiuj en tiu tempo agas kaj oni povas konstati, ke ekz. iu persono en sia vivo estis pli ofte egoisto ol altruisto, pli ofte franco ol alzacano, pli ofte saĝa ol malsaĝa. Statistike el tio eblas diri, ke li estis pli egoista ol iu alia, sed oni ne povas aserti ke li estis nur egoisto.

Tial mi serĉis faktorojn kaj leĝojn por klarigi la homajn agojn kaj reagojn, la homan konduton.

Mi travivis la tempon de milito kaj konstatis ke simplaj normalaj homoj, bonaj familianoj fariĝis kruelaj murdistoj. Revene el la milito ili refariĝis simplaj "bonaj" civitanoj. Ĉu temas pri speco de homoj, kies konstanta stato estas potenciala murdado? Ne. Ni ĉiuj reagis en certaj situacioj same. Ankaŭ vi, kara leganto, estas potenciala murdanto!

Ĉiu maso havas strukturon. La strukturo difinas la celojn de tiu maso. En la tempo ĝi strebas al sia celo. Ĉiu strukturo estas parto de iu pli supera strukturo, kaj tiu ĉi same de iu ankoraŭ pli supera. Tiel ĉiu strukturo apartenas al aliaj strukturoj kaj ĝia celo estas ekzisti tia kia ĝi estas kaj plenumi la rolon kiun ĝi havas en pli superaj strukturoj. El tio konsekvence eliras la kibernetika funkcio, la t.n. stirkonduco de la strukturoj (energieroj).

La kibernetiko komprenas la mondon jene: Ĉio en la kosmo dinamikas, pulsas. Ĉiu ekzistaĵo aŭ subjekto (kial mi nomas ĉiun ekzistaĵon subjekto, mi klarigos poste) en tiu dinamikado havas CELON. Por atingi la celon ĝi devas stiri sian moviĝadon kaj konduton. Kibernetiko estas scienco pri STIRADO. Por povi stiri, ĉiu ekzistaĵo devas akceptadi informojn pri eksteraj influoj kaj pri la propra sukceso/malsukceso rilate la celstrebado, por povi korekti sian direkton (agadon). Prilaboro de informoj estas kampo de informatiko. Moderna informatiko produktas ĉiujn siajn varojn (komputilojn, aŭdvidajn aparatojn, poŝtelefonojn, robotojn...) konsiderante ĉiam tiun ĉi bazan kibernetikan aksiomon. Aparato estas produktita kun iu celo (ĝi devas kapabli ion). Ĝi konsistas el sistemo por kolekti informojn, por prilabori ilin kaj produkti tion,



por kio oni inventis ĝin – sed ĝi devas daŭre kontroli ĉu ĉio funkcias bone por atingi la celon. Tial la ekzistaĵo (subjekto) enhavas ankaŭ la sistemon por retrokuplo. Tiu sistemo sendas informojn pri la rezultoj de la propra celstrebado al la sistemo de informkolektado (reen) kaj en la kontroloko okazas decido baze de komparo inter direkto celata kaj direkto realigata, ĉu ion ŝanĝi aŭ ne.

Kompleta informfluo en simplaj kaj kombinitaj sistemoj baziĝas je binara aŭ diĝita (dueca) bazo kaj je tiu maniero funkcias ĉiu strirado, ĉiu decidado. Ĉiam temas nur pri du ebloj: Ĉu la ŝipo verutas al bona direkto aŭ ne? Ĉu ekzistas malamiko? Se jes, mi pretigas min por la batalo, se ne, mi kvietas. Ĉu la malamiko proksimas? Se jes, mi ekstreme ekscitiĝas, se ne, mi racie pripensas. Ĉu la malamiko jam atakas min? Se jes, mi kontraŭbatas. Ĉu li estas pli forta? Se jes, mi provas fuĝi, se ne, mi atakas... Tiel funkcias ankaŭ fizikaj leĝoj. Ne ekzistas leĝo, kiu ne havas kontraŭleĝon. Nur kune en la tempo ili konsistigas la tuton, kiu ebligas la ekvilibrantan funkciadon. Ago kaj reago, entropio/malentropio, ordo/kaoso, centrifugo/centripetalo, elektra/magneta kampo...

Mi konstatis ke por deĉifri la plej komplikajn estaĵojn de la naturo – la homon – ekzistas vojo. Ĝi estas la studo de la homa lingvo, kiel formala, mezurebla produkto de la funkciado de la cerbo. La lingvo estas sistemo per kiu ni klarigadas, bildigas, priskribas statojn kaj procesojn. Tiu sistemo je la formala nivelo estas jam de jarmiloj studata kaj gravaparte deĉifrita. Oni konstatis ke vortoj dividiĝas laŭ funkcioj kaj havas siajn rolojn. Iuj estas gravaj kaj memstaraj, aliaj havas nur certajn kromrolojn. Kiam oni komprenis kiuj vortoj estas substantivoj, kiuj verboj... oni povis ellabori gramatikon, regularon laŭ kiu la vortoj interrilatas por konstrui frazojn kiuj analogias al bildoj esprimataj. Tiusence vortoj havas hierarkian valoron. Substantivoj, personaj pronomoj kaj iuj gramatikaj finaĵoj havantaj la rolon de personaj pronomoj havas la hierarkian rangon 1. Sekvas verboj kaj adjektivoj (en ilia rolo

ankaŭ adjektivaj prepozitivoj kaj subjunkciaj frazoj) kun la rango 2. Poste troviĝas adverboj kaj adverbaj prepozitivoj kaj adverbaj subjunkciaj frazoj kun la rango 3 ktp.

Sed krom hierarkio de vortoj kaj vortkompleksoj laŭ ilia formo, ekzistas ankaŭ la hierarkio de signifoj. Studante tiun fenomenon de morfoj kun unu semantemo (morfemo aŭ vorta formo kun unu signifo) kaj plurmorfajn semantemojn (pluraj vortoj kiuj kune prezentas nur unu signifon) mi konstatis ke la lingva funkciado havas analogiajn leĝojn en aliaj sciencoj. Krome – gravegas ke dum siaj evoluoj la socioj komencis distingi per vortoj diversajn sentojn kaj psikajn statojn. Tiuj vortoj montras al ni kiel funkcias nia cerbo, se ni sukcesas ordigi ilin kibernetike. Mi komencis ellabori la skemon de racie-emocia funkciado de la homo kombinante analogiajn komprenojn de la fizikaj leĝoj kaj tiuj de lingvistiko, sed longe mi ne sciis kiel en simpla maniero klarigi al la publiko, kion mi efektive celas. Kaj iun nokton en la jaro 2004 mi havis interesan sonĝon. Verŝajne estas strangaĵo, se iun sciencan, racian produkton oni enkondukas per sonĝo, sed ankaŭ tio montras la efektivan samgravecon de racio kaj neracio en la klarigado de la naturfunkciado kaj funkciado de la homo.

En la unua parto de la sonĝo aperas homoj en tramo kaj mi kun iu ino (verŝajne mia edzino) kaj infano. Ni diskutis pri bildkarto, sur kiu troviĝis la vorto WARAN kaj ni mire konstatas ke iel inversigita ĝi estas legata KADIZ kaj ke tiu homo havas du nomojn. Elirante la edzino montras iun viron kiu malfermas la mantelon por montri sian nudon, sed ni ne impresiĝas de tio. Mi aliras iun afiŝofoston apud kiu mia edzino ŝanĝas sian pantalonon por montri sin al mi en la nova vesto. Aliflanke de la fosto la samon faras alia paro da homoj kun infano. Mia infano diras: “Vanja ploras.” Mi ekridetas pro tio ke mia infano memoras la nomon de la alia. Tiam vekas min mia vera edzino Ruĵa. Mi eksidas en la lito kaj diras al ŝi kion mi sonĝis. Vidante ke la lito estas tiu en mia malnova domo el la juneco, mi ekkonscias ke mi ankoraŭ sonĝas kaj ekscite diras al Ruĵa, ke temas pri plurtavola sonĝo, samkiel la vor-

toj havas plurtavolajn rolojn, kvankam ili estas metataj en tempa sinsekvon laŭ kiu ne klaras tiu plurniveleco, samkiel nun sinsekve okazas du sonĝoj unu post la alia, tamen ne samrangaj. Ruĵa eltiras elsub mia kusenon alian kusenon dirante ke tiun kusenon submetis mia pli aĝa frato Rudi, kiu dormis ĉi tie antaŭe kaj ĵetas ĝin. Ĝi frakasiĝas kaj el ĝi elflugas amaso da paperetoj kun vortoj sur ili. Tiam mi vere vekigis (estis ankoraŭ nokto) kaj iris tuj pri-skribi la tutan sonĝon antaŭ ol ĝi estos forgesita.

La sonĝo havis eĉ tri nivelojn, ĉar la infano parolis pri Vanja, do konis la nomon de alia infano – sekve iamaniere tio signas, ke iam en antaŭa sonĝo la infanoj interkonatiĝis. Tiuj kiuj kredas ke sonĝoj portas mesaĝojn povus analizi ĝin kaj eble konstati ke ĝi diras multon pri mi kaj mia vivo. Certe ĝi ebligis al mi fine komenci ĉi tiun libron, kiun mi kovis en mi dum jardekoj kaj ebligis al mi homsimple enkonduki mian intencon: La naturon ni povas kompreni nur je du manieroj: nombrante fenomenojn kaj sekvan-te ilin. Natura nombrado estas la binara (dueca) sistemo kaj la sekvado signifas analogiadan. En la tempo ĉio havas linian karakteron. La vortoj fluas en tempa linio kontinue, kaj ŝajnas ke ili estas egalrangaj. Sed tio ne ĝustas. Ili havas diversajn funkciojn laŭ rangoj disdividitajn laŭ branĉa strukturo, duece.

Ĉu la sonĝo diris al mi ke mian vivon difinis unuanivele mia frato Rudi kiu fakte trovis ie lernolibron de Esperanto kaj lasis ĝin al mi kaj ke tiu fakto startigis la proceson en kiu iam mi komprenos la analogion inter vortaj sinsekvoj kaj vortaj hierarkioj tra sonĝa eksplodo de kusenon en kiu ĥaoso da paperetoj kun vortoj senordas kaj tamen havas subordigitajn funkciojn. Same estas en la homa korpo. Ekzistas genoj kun diversaj hierarkiaj funkcioj kiuj troviĝas en linia sinsekvo ene de DNA-molekulo. Ene de ĝi ŝajnas ke ĉiuj havas la saman rangon. Sed tute ne. Ili havas tre diferencajn rolojn kaj estas hierarkie ordigitaj en reciprokaj rilatoj.

Analogie oni povas fari ankaŭ la jenan komparon kun la sistemoj en elektroniko. Unuanivele ni povas observi simple la materion kiel rezistoron kiu kaze de kurenta trapaso povas iĝi kapacit-

aŭ induktivkaraktera. El ties kombino ekestas duanivela materio: diodo (duonkonduktoro). Sur pli supera hierarkia nivelo troviĝas kombino de diodoj el kiu iĝas transistoro. Kombinante rezistorojn, kondensatorojn, induktivelementojn, transistorojn ni konstruas sistemojn de pli supera rango kun novaj funkcioj kiel la amplifiloj, kurentegaligiloj, transformatoroj ktp. Kombinante ilin oni konstruas aparatojn diversfunkciajn je pli supera nivelo: radion, televidon, roboton. Kunligitaj diversaj komputiloj, televidiloj ktp konsistigas sistemon de komunikado. Pluraj komunikadsistemoj kunligitaj per satelitoj, energicentraloj ktp. konsistigas ankoraŭ hierarkie pli superan komunikadretan...

Se laiko rigardas la tuton, li havas la impreson pri hazarde dismetitaj diversaj eroj, kvazaŭ ĥaose disĵetitaj paperetoj el la kuse-no, kiujn li povas observi en tempa linio, parton post parto, kaj ne povas iel ajn deĉifri kiuj el ili estas en kiu funkcio kaj hierarkia nivelo laŭ kiu ili konsistigas funkciajn sistemojn.

Ĉar laŭ mi la lingvo estas medio per kiu eblas penetri la sekre-ton de la homa funkciado kaj la maniero kompreni la funkciadon de la naturo, ĉar ĝi posedas vortojn kiuj reprezentas emociojn kaj raciaĵojn, necesas esplori ĝin el la jena vidpunkto: la lingvo realiĝas kiel teksto je kontinua sinsekvo de vortoj en tempa linio. Ni ne scias kiu vorto troviĝas en kiu funkcia rango nek ni scias laŭ kiuj kriterioj la rangoj establiĝas. Sekve necesas malkovri la krite-riojn kiel la rangoj estiĝas kaj en kiuj rangoj troviĝas kiuj vortoj. Gravas trovi la plej suprajn, unuagradajn rangojn (harmonikojn), kiel gravas en iu tute senregula kurbo trovi la unuan, duan, trian... sinusoidon el kiuj ĝi konsistas. Kvankam ĝi konsistas el grandega kvanto da superponitaj sinusoidoj, tamen la ĉefaj, kelkaj unuaj gravas por difini la esencon. Tial en tiu ĉi verko mi faris ĉi tiujn unuajn paŝojn per la metodo de analogiado inter leĝoj de kiber-netiko kaj logiko (strukturo de komputilo baziĝas je tiuj leĝoj) kaj leĝoj de psikologio kaj sociologio (strukturo de la cerbo baziĝas je tio). Mi difinis kelkajn unuagradajn rangojn, difinis kriteriojn (demandojn baze de kiuj okazas decidoj en disbranĉiĝoj) laŭ kiuj

tiuj ĉi rangoj formiĝas kaj difinis la rangojn mem per vortoj kiuj reprezentas unuopajn emociojn kaj raciaĵojn en la funkciado de la homo.

Restas por mi pluraj malfermitaj demandoj kaj necertoj. Necesos verŝajne dubindigi je miaj sesa, sepa niveloj eĉ la disbranĉiĝojn mem, rearanĝi la elektitajn vortojn, ĉar simple en tiuj pli foraj niveloj necesas kolektiva laboro por trovi la ĝustajn respondojn. Tie influas jam tro da faktoroj samtempe por ke unu nura persono povu konsideri ĉiujn. Krome, post la sepa disbranĉiĝo ekzistas multaj kiuj estu esplorataj. Tial ĉi tiu verko estas starta elirpunkto por scienco serĉi pli detalajn elementojn en la hierarkia strukturiĝo de la naturo. Tiam ni scios multe pli pri la naturo de ĉiu kosma ero sed antaŭ ĉio pri la naturo de la homo.

2

BAZAJ NOCIOJ

Ekzistado ampleksas ĉion, kion la homo povas percepti kaj per siaj sentumoj kaj per ĉiuj aparatoj kiuj plibonigas liajn sentumojn, kaj ĉio ampleksas kaj la universon kiel tuton kaj ĉiujn sennombrajn erojn el kiuj ĝi konsistas. Ĉiu ero povas esti difinita kiel aganta materio en tempo kaj spaco. Aganta signifas influanta al aliaj ĉirkaŭaj eroj. Baze de tio eblas kibernetike koncepti ĉiun eron en sia tempa dinamika ekzisto kiel ion kio kondukas laŭ certaj algoritmoj antaŭviditaj de la ekzisto mem kaj funkciantaj laŭ la branĉa strukturo. La komenco estas la arbo mem, ĝi estas la komenco de la ekzistado. La disbranĉiĝoj okazas laŭ niveloj kiujn ni nomu harmonikoj. Unua nivelo aŭ unua branĉo estas tiam kiam la arbo disbranĉiĝas al du branĉoj, la dua nivelo aŭ dua harmoniko estas kiam ĉiu el la du branĉoj disbranĉiĝas al novaj du, do la arbo al kvar. La 3-a nivelo aŭ harmoniko estas kiam ni havas jam 8 branĉojn kaj tiel plu.

Ĉi tie ni devas enkonduki la nocion de kaŭzo, kiun la fiziko ne konsideras, ĉar ĝi esploras la universon el la vidpunkto de neŭtrala objekto. Kibernetikaj esploroj eliras el la vidpunkto de subjekto, konsiderante ke efektive eblas kompreni la kompleksecon de la mondo nur el la vidpunkto de subjekto. Subjekto estas atomo, se oni vidas ĝin kiel strukturon kiu ne nur ekzistas, sed ankaŭ havas celon: plufunkcii en la ekzistanta strukturo, malpermesi ke ĝi estu detruita de aliaj ĉirkaŭaj eroj, sed subjekto estas kompreneble ankaŭ ĉio alia ĝis la homo mem. Tio estas grava por kompreni. Esploristo en fiziko klopodas esti neŭtrala faktoro super la esploroobjektoj, dum kibernetika esploristo estas mem subjekto kiu studas aliajn subjektojn.

Ĉi tie mi konsideras ankaŭ la demandon KIAL. Se ni volas fundamente kompreni ĈION, ni devas konsideri ankaŭ tiun faktoron, kiu ankaŭ karakterizas kibernetikon kaj diferencigas ĝin de fiziko. Nome la disbranĉigadoj kiuj havas hierarkian tempan sinsekvadon devas esti respondoj al demandoj. Kaj la nocioj: demando kaj respondo estas filozofiaj terminoj kaj rilatas al la ĝenerala enkonduko de la termino kaŭzo (senco). Kiu demando kaŭzas disbranĉigon je nivelo 1, kiu je nivelo 2 ktp devas esti malkovrita. La esenca problemo estas ĉiam malkovri la unuajn kelkajn harmonikojn.

Kaj la lasta grava nocio kiu estas enkondukata, kiu cetere estas esenco de kibernetiko, estas la CELO. En la tempo ĉiu ero simple devas strebi al iu celo kaj klopodi atingi tiun celon, sekve ĝi devas kapabli stiri sin mem al la celo.

Oni povas disdividi la erojn de la universo (subjektojn) je NEVIVA AGANTA MATERIO kaj la VIVA AGANTA MATERIO.

La nevivan materion studas FIZIKO kiu kiel metodon uzas matematikon. La esenco de matematiko estas nombrado kaj la plej natura sistemo nombri estas nombrado per du ciferoj, do diĝita matematiko.

Oni sekve povas diri ke fizikon karakterizas diĝiteco.

La tuton de neviva kaj viva materio studas KIBERNETIKO, kiu uzas kaj la metodojn de diĝita matematiko kaj tiun de logiko, kiu ĉefe serĉas analogiojn. Fiziko estas scienco pri KIEL (kiel funkcias la materia mondo?). Kibernetiko diferencigas de FIZIKO per tio ke ĝi estas scienco pri KIEL kaj KIAL. Ĝia komenca aksiomo estas ke ĉio havas kaŭzon (sencon) kaj sekve de tio ankaŭ celon kaj tial ĉio en la universo ekzistas navigante (direktante sin al siaj celoj). Krome, ĝia elirpunkto estas tiu de subjekto. Kiel la subjekto vidas la ĉirkaŭaĵon kaj sentas ĝin kaj kiel ĝi reagis. Ĝiaj metodoj sekve estas kaj la matematika diĝiteco kaj la logika analogiado.

* * *

La viva materio estas plia ŝtupo de evoluo de neviva materio sed diferenciĝas de la neviva per tio ke ĝi plie posedas konscion kaj kapablon de reproduktiĝo, kiun la neviva materio ne havas. Al la konscio estas ligitaj pliaj du karakterizoj: posedo de racio kaj emocioj.

La neviva materio ekzistadas baze de precize antaŭvidita softvaro je kvar komencaj niveloj (harmonikoj), pri kio vi legos poste, kaj la viva materio aldonas al la precize planita softvaro de kvar niveloj pliajn nivelojn ligitajn al la konscio, kiuj ebligas lernadon kaj adaptiĝadon al novaj cirkonstancoj.

Ĉiuj eroj (subjektoj) en la universo estas strukturoj (materiaĵoj kiuj estas organizitaj laŭ certa strukturo kaj nemateriaĵoj kiuj estas karakterizitaj de agokonduto) kaj tiuj strukturoj funkcias laŭ principoj de logiko kaj oni povas prezenti ilin per la informadikaj skemoj kiuj montras procedojn, kiuj kondukas al decidoj kiel reagi.

Unuaj kvar niveloj de disbranĉiĝoj rilatas al ĉio (kaj al neviva kaj al viva materio) dum postaj niveloj rilatas nur al la vivaĵoj.

Ĉion tion mi pli detale priskribos en la postaj skemaj ĉapitroj.

3

LA BAZA 4–NIVELA SKEMO

Kvankam la skemo validas por ĉiu universero kiel subjekto ekde atomo ĝis homo, mi klarigos la skemon je la nivelo de homo-subjekto, kompreneble, ĉar tiel la leganto povos kompreni.

La homo, do MI, estas ero kiu iĝas subjekto en la apliko de la skemo. Kaj la procedo komenciĝas per demandoj, sekve per leĝoj de logiko.

UNUA DEMANDO stariĝas: Ĉu EKZISTAS ekstera forto? Ni nomu ĝin DEMANDO DE EKZISTO.

RESPONDO (post uzo de la sensoroj enkonstruitaj en ĉiu subjekto) NE signifas ke la subjekto ne spuris ion ajn ekstere kio altirus ĝian atenton kaj sekve por ĝi ne ekzistas io el ekstero pri kio ĝi okupiĝus. Tio signifas, ke ekde nun ekzistas nur la subjekto mem (MI) kiel grava forto. Post tiu ĉi respondo la tuta priokupiĝado de la subjekto transiras al la KAMPO DE BEZONOJ, kiujn havas la korpo de la subjekto inkluzive de la cerbo kaj psikaj bezonoj. Se la respondo estas JES (ĉar la sensiloj trovis ion signifan ekstere), la priokupiĝado transiras al KAMPO DE SINGARDO.


Sekvas la DUA DEMANDO: Ĉu la forto direktiĝis al la subjekto? Tio estas DEMANDO DE DIREKTO. Ĝi aperas kaj en la kampo de bezonoj kaj en la kampo de singardo. Unue ni rigardu la kampon de singardo (kiam efikas la ekstera forto). Se la respondo estas NE (post uzo de la sensiloj, kiuj mezuras la direkton), do la ekstera forto ne rekte influos la subjekton, ĝi komprenas tiun forton kiel potencon, potencialan danĝeron kaj ties atento troviĝas sur la kampo de POTENCO. Nome kiam iu fizika forto ne rekte


1. nivelo
Ĉu egzistas
ekstera forto?

2. nivelo
Ĉu la forto
direktiĝis al mi?

3. nivelo
Ĉu la forto efikas al
mi kiel individuo?

4. nivelo
Ĉu ĝi rapidas?





realigas sin: iu futbalpilko ne trafas la subjekton, sed preterflugas, ĝi nur postlasas la konscion pri tio kian potencon ĝi havis kaj sekve ĝi influis la subjekton kiel iu potenco, povo. (Kio povus esti se ĝi trafus?). Se la respondo estas JES, la subjekto transiras al la KAMPO DE DANĜERO.

Nun ni rigardu la samon en la kampo de bezonoj, kie regas la subjekto mem kiel forto. Do la demando: Ĉu la forto direktiĝis al la subjekto, signifas, ĉu la bezono(j) de la subjekto direktiĝis al ĝi mem (rilatas al la subjekto mem)? Se la respondo estas NE, do la bezono ne gravas por la subjekto mem, ekz. ne temas pri malsato, doloro aŭ simile, la atento de la subjekto transiras al la kampo de POTENCO kie ĝi efikas al ĝi mem nur kiel potenco (regpotenco kiu klopodas regi la subjekton mem). Se la respondo estas JES, do efektive aperis iu doloro aŭ malsato aŭ alia sento kiu alarmas mankon, problemon... tiam la subjekto transiras al la kampo de DANĜERO. Se la subjekto ne kontentigos la malsaton, tio kaŭzos damaĝojn.

Sekvas la tria demando, la sama nun jam en kvar eblaj kampoj (singardo-danĝero, singardo-potenco, bezonoj-danĝero, bezonoj-potenco): Ĉu la forto direktiĝis al mi-subjekto, mi kiel individuo, ĉu ĝi rekte trafos min, la homan subjekton? En ĉiuj kvar kampoj la respondo NE signifas ke ĝi direktiĝis al grupo en kiu mi estas membro, en kiu mi estas parto. La forto ne direktiĝis al la subjekto mem, sed al la grupo en kiu ĝi membras. Pro tio la NE-respondo kaŭzas la transiron al subkampoj GRUPECO (altruismo). Se la respondo estas JES, transiras ĉio al la subgrupo UNUOPECO (egoismo). Nun ni havas 8 novajn subkampojn: singardo-danĝero-grupeco, singardo-danĝero-unuopeco; singardo-potenco-grupeco, singardo-potenco unuopeco; bezonoj-danĝero-grupeco, bezonoj-danĝero-unuopeco; bezonoj-potenco-grupeco, bezonoj-potenco unuopeco.

Kaj la kvara baza demando estas DEMANDO DE RAPIDECO: Ĉu la forto estas tre rapida? Ĉu ĝi tre baldaŭ efikas? Kompreneble ankaŭ nun la sama demando validas por ĉiuj ok subkampoj.

Se la respondo estas JES, tio signifas ke en ĉiuj ok kampoj la tuta agado transiras al la subkampo AŬTOMATECO (necesas tuja reago aŭtomata, sen aktivigi la konscion). Tiu kampo aktivigas tuj la reagon antaŭviditan en la strukturo, antaŭviditan kaj genetike enkonstruitan en la homa strukturo laŭ unu el la ok bazaj submanieroj depende de tio en kiu kampo ĝi okazis.

Se la respondo estas NE (do la forto ankoraŭ malrapidas kaj ne proksimas, sekve ekzistas tempo por aktivigi konscion kaj en ĝi serĉi la ĝustan reagon) la tuta plua funkciado transiras al unu el la ok subkampoj de la KONSCIO.

Videblas, ke la kompleta ĝisnuna kvarnivela skemo realiĝas en la tiel-nomata ROM-parto de la “administra” sekcio de la subjekto (en nia kazo la homo), do en iu parto de cerbero en kiu ne necesas konscio kaj tial tiun ĉi kvarnivelan ROM-parton de la “komputilo” posedas ĉio: nevivaĵo kaj vivaĵo. Kaj la postajn nivelojn, nivelojn de la konscio havas nur vivaĵoj.

Verŝajne la legantoj demandos sin kiel oni povas paroli ĉe la nevivaj strukturoj pri danĝero, bezonoj, singardo, potenco...

Tio eliras el la aksiomo ke ni studas ĉion el la vidpunkto de subjekto kaj el la baza filozofio de kibernetiko, ke ĉio, inkluzive de nevivaĵoj havas sencon kaj celon. La baza senco kaj celo de ĉiu subjekto ĉu malviva aŭ viva estas laŭeble longe ekzistadi en la momenta strukturo. Tiukaze ankaŭ por atomo ekzistas neceso de singardo kaj internaj bezonoj kiujn havas la strukturo, danĝero por detruigo, potenco kiu al ĝi efikas, ankaŭ ĝi estas aŭ individua atomo al kiu povas rekte influi eksteraj pafoj kiuj ĝin disfrakasos aŭ ĝi povas esti parto de molekulo.

Same la leganton verŝajne surprizos la aserto ke ĉiuj vivaĵoj de virusoj ĝis la homo havas konscion. Tiu miro venas de pli vasta homcentrismo koncepto kiun oni havas nun pri la nocio de memoro kaj konscio. Memoro povas esti konceptita kiel kapablo de subjekto reagi alimaniere baze de ŝanĝoj kaŭzitaj en ĝia strukturo de ekstera forto post kiam la sama forto reefikos. Ĝi ion memoris

kaj lernis. Simpla konata fakto estas ke magnetaj kampoj ŝanĝas la magnetismon en ferpeco kaj poste la sama magnetika kampo havas alian efikon al la ferpeco ol la unuan fojon. Sekve la memoron havas ĉio: kaj nevivaĵo kaj vivaĵoj. Ĉiuj vivaĵoj havas la kapablon senti kaj reagi kaj analogie, se ili povas senti, ili havas ankaŭ iun konscian formon de racio kompreni kaj decidi pri reagoj. Tio kompreneble ne estas pruvebla sed la analogieco nepre kondukas nin al tia konkludo.

Ĝis la kvara nivelo ĉio okazas sen konscio. La interna softvaro kiel ĉe nevivaĵo tiel ankaŭ ĉe homo starigas la demandojn kaj respondas al ili baze de mezuradoj far internaj instrumentoj ekz. sensiloj enkonstruitaj en la strukturo, en nia softvaro mem, kaj tio kaŭzas aŭtomatan (senkonscian) reagon kiu ĉe vivaĵoj estas afekcioj kaj refleksoj. Sed ĉe la vivaĵoj post la kvara nivelo, kaze de nea respondo malfermiĝas nova nivelo bazita de konscio, kiun la nevivaĵoj ne posedas.

Oni povas analogie kompare diri ke la unuaj kvar niveloj estas en la netuŝebla kaj neŝanĝebla skatolo, kio en la komputilo prezentas la tiel nomatan ROM-parton kaj la postaj niveloj troviĝas en la RAM-parto de la vivaĵoj.

Plia analogia ekzemplo, kiu klarigas la branĉan kaj diĝitan karakteron de la naturo estas en la sfero de vivaĵoj. Kiam fruktiĝas bebo en la utero, unua ovoĉelo disiĝas je du ĉeloj, la du je kvar, la kvar je 8, la ok je 16 kaj 16 al 32. Ĝis tiu kvara nivelo la ovo tute certe disiras regule je duoblo da ĉeloj. Poste ne plu nepre ĉiu branĉo havas duoblecon. Iom post iom iuj branĉoj haltas kaj aliaj abunde disvastiĝas kaj la kresko daŭras longe ĝis iam ĉiuj branĉoj ne plu havas novajn disbranĉiĝojn. Tiel funkcias ĉiu kreskado kaj evoluo.

Resume ni diru: Universeroj vidataj kibernetike kiel subjektoj kondutas laŭ kibernetikaj leĝoj, kio signifas ke kiel subjektoj ili sentas influojn de eksteraj fortoj kaj la propran forton kaj reagas al tiuj influoj baze de logikaj demandoj. La 4 bazaj logikaj deman-

doj estas: demando de ekzisto, demando de direkto, demando de grupeco kaj demando de rapideco. Tiuj kvar demandoj estas antaŭviditaj en la strukturo de ĉiu subjekto kaj estas enkonstruitaj mezursensiloj baze de kiuj eblas tujaj respondoj ĝis la kvara demando. Se la respondo al la kvara demando estas JES (la forto estas rapida), la aŭtomatismo en la ROM-parto de la subjekto decidas pri reago, kiu ne havas rilaton al la konscio. Ĉio okazas en ni, sen nia scio. Nur se al la kvara demando la respondo estas NE, malfermiĝas nia RAM-parto, konscia parto kiu ne nur serĉas en konscio respondojn al postaj demandoj, sed ankaŭ povas lerni kaj evoluigi novajn branĉojn. Ekde tiu ĉi nivelo ni povas observi novajn nivelojn (kvinan, sesan, sepan...). Nun la esplorkampoj vastiĝas konstante al sennombraj kombineblecoj kaj estas malfacile malkovri kiu branĉo ie ĉesis kaj kiuj plu evoluas. El la filozofia vidpunkto la 4 demandoj montras al ni la du fizikajn adekvataĵojn (direkto prezentas la spacon kaj rapideco la tempon) unu prezentas ontologian demandon de ekzisto kaj unu demandon de duopeco unuopaĵo-aro.

Mi mem sur sekvaj paĝoj montras tre verŝajnan logikon, kiuj estas demandoj je kvina kaj sesa nivelo kaj parte je la sepa. Por mi estis krea kaj ekscitiga laboro analogie serĉi en la kadro de logiko kaj helpe de strukturo de lingvo, kiuj estas demandoj je postaj niveloj kaj kiuj emocioj informas nin pri diversaj respondoj. Tiel mi profundigis la komprenon de logikaj leĝoj. La ĝisnuna uzata leĝaro de la logiko ampleksas la operatorojn: JES, NE, KAJ, AŬ, SE, TIAM, PLI, MALPLI sed mi trovis kelkajn pliaj operatorojn: Vi vidus ke ĉe la kvina nivelo aperas krom PLI-MALPLI ankaŭ SIMILA-MALSIMILA kaj je la sesa nivelo KRESKAS-MALKRESKAS, EKSTREMA-NEEKSTREMA. Pli postaj logikaj operatoroj devas esti malkovritaj. Tio estas laboro por teamoj, ĉar unu nura persono ne povas havi tian vastegan superrigardon.

La sekvaj partoj de ĉi tiu libro estas prezentitaj en formo de kibernetikaj algoritmaj skemoj konsiderante la subjekton kiel ion kio konsistas el centra unuo kun ROM kaj RAM-memoro. Baze

de influoj de ekstera aŭ interna propra forto en la centra unuo kompariĝas tiuj influoj unue kun demandoj de la ROM-memoro kaj kaze de JES-respondo en la kvara nivelo la centra unuo mem decidas kiel reagi, kion mi montris en ok kazoj de ROM-aŭtomatismoj. Temas pri aŭtomatismaj reagoj je ok diversaj manieroj, al kiuj ne influas nia konscio kaj kiuj estas antaŭviditaj en la strukturo de la subjekto.

Aliaj ok ebloj rilatas al 8 konsciaj branĉoj kaj ilin mi montras kun apliko de kvina kaj sesa demando kaj supozata disbranĉiĝo denove je po du branĉoj. Mi ne scias ĉu jam la kvina demando havas disbranĉiĝojn de la ok konsciaj branĉoj al dek ses novaj, ĉar kelkloke mi jam havis pri tio dubojn, kvankam ŝajnis al mi ke ekzistas ĉiuj 16 novaj branĉoj. En la sesa nivelo mi jam havas plurajn lokojn kie mi ne trovis adekvatan novan branĉon kaj sekve estas verŝajne ke ĉi tie ne plu “kreskas” ambaŭ disbranĉiĝoj, do ke ni ne havas je tiu nivelo ĉiujn 32 novajn kampojn. Mi lasis tamen tiun eblon.

Parto de la sepa nivelo kaj pluaj estas afero de estontaj esploroj.

Necesas ekspliki ankoraŭ ion, kion la homoj ne ankoraŭ unike komprenas. Nome kio estas la grupeco? La grupeco ĉe vivestaĵoj estas forto kiu ligas individuon al grupo, io adekvata al fortoj kiuj ligas atomon en molekulo ĉe la neviva materio. Molekulo diferenciĝas de aro da individuaj atomoj per tio ke en ĝi la atomojn kunligas iuj fortoj kiuj ŝanĝas la konduton de la individua atomo kaj igas ĝin parto de pli supera strukturo en kiu ĝi havas sian rolon. Same la grupeco estas forto kiu evoluigas senton en individuo kiu ligas lin forte al iu aŭ pluraj aliaj individuoj, donas al li rolon en grupo kaj igas lin respondeca pri la grupo. La individuo do povas esti nur unu el hazardaj homoj en la amaso kiuj ne estas inter si ligitaj per la sento de grupeco aŭ membro de grupo kun pli aŭ malpli forta sento de grupeco. Por klarigi pli klare tiun gravan distingon mi rakontos okazaĵon, kiam mi pro operacio de nazo devis restadi 7 tagojn en hospitalo. Oni metis min en komu-

nan ĉambrom en kiu kunestis 8 viroj: 7 junuloj 17-23-jaraj kaj mi estis ununura pliaĝulo (pli ol 50-jara). Hazarde ni ĉiuj 7 envenis la hospitalon en du sinsekvaj tagoj kaj ĉiuj estis operaciitaj ankaŭ en du sinsekvaj tagoj. Mi pro polipoj kaj la gejunuloj pro estetikaj kaŭzoj. Ne temis pri danĝera operacio, tamen necesis resti en la hospitalo 7 tagojn. La unuan tagon post la operacio ĉiu estis iom en neplene konscia stato ĉar oni prenis iom da kontraŭdolorigaj medikamentoj, sed jam la postan tagon ĉiuj normale kondukis. Tio signifas ke temas pri personoj kiuj antaŭe ne konis sin, kiuj en la unua tago estis individuoj kiuj sentis nenion unuj por la aliaj kaj neniel temis pri iu grupo. Tiuj individuoj devis resti pliajn 4 tagojn kune en la sama ĉambro sen senti iujn dolorojn aŭ malfacilaĵojn. Nun evoluis procedo de grupigo. Komence la gejunuloj babilis inter si kaj eksciinte ĉiam pli unuj pri la aliaj interkonatiĝis. Tiam ili komencis kartludi kaj evoluis situacioj en kiuj oni havis iujn celojn, “batalojn”, koaliciojn, venkojn. Kaj post kelkaj horoj subite unu el ili proponis: Ĉu ni premu al la ŝaltilo per kiu oni invitas deĵorantan flegistinon, se estas iu urĝa bezono. Kelkaj tuj konsentis por havi amuzon, kelkaj kontraŭis. La proponinto tuj atakis la kontraŭulojn proklamante ilin timemuloj kaj malkuraĝuloj. Fine ankaŭ ili malvolonte konsentis kaj la proponanto premis la ŝaltilon. Alkuris flegistino kaj vidinte ke ili ŝercis kolere foriris. Post iom da kartludado, la iniciatanto (memproponita grupgvindanto) denove proponis ke oni premu la ŝaltilon. Nun kelkaj denove protestis, sed post lia pli energia riproĉado pro malkuraĝo ili konsentis. Ĉi-foje la flegistino estis ege kolera kaj forte riproĉis al ili. La sekvan tagon je la sesa matene la flegistino vekis ĉiujn kaj disdonis termometrojn por mezuri temperaturon. La memproklamita ĉambrestro tuj havis proponon (ĉar la flegistino foriris por reveni post kvin minutoj): Ni ĉiuj metu la termometrojn sub varmega akvo de la enĉambra krano kaj ni levos la temperaturon de la termometroj al 40 gradoj. Kelkaj protestis sed fine akceptis. Komprenible ke la surprizo de la flegistino estis granda antaŭ ol ŝi komprenis ke ili denove ŝercumas post kio ĉiuj ridegis. Dum la tri

postaj tagoj la estro ĉiam pli fortigis sian povon (pozicion de ĉefo) kaj ĉiuj obeis lin (min ili lasis flanke kiel pliaĝulon kiu ne apartenas al ili, sed ankaŭ ne damaĝas) kaj li daŭre proponadis novajn kaj novajn aventurojn (por ke ili “amuziĝu”). Post tri-kvar tagoj ĉiuj sep iĝis grupo forte ligita en kiu ĉiuj pretis agi por la grupo senkonsidere pri la danĝero kiu minacas ilin. Mi komprenis ke ne temas pri simplaj friponaĵoj de junuloj, sed pri grava socia leĝo. Kiam iom pli longan tempon kunvivas kelkaj personoj kune, tuj ekestas gvidanto kaj procedo pri transpreno de taskoj kaj respondecuoj. Daŭra postulado de la ĉefo fari por ili danĝerajn friponaĵojn ne estis esprimo de “amuzemo” sed serioza procedo en kiu individuoj devas iom post iom perdi sian individuecon kaj montri ke ili pretas fari aferojn danĝerajn por ilia individueco, sed por tiel pruvi al ĉiuj sian grupapartenon kaj pretecon viktimiĝi por la grupo. Kiam la lastaj “protestantoj” ne plu protestis sed senproteste obeis novajn proponojn (postulojn) de la ĉefo, ekestis absoluta grupo, en kiu ĉiuj estis ligitaj kaj pretaj batali por plua ekzisto de la grupo. Tiu procedo finiĝis post tri tagoj. Ĉiuj individuoj kiuj antaŭe ne estis membroj de tiu grupo (ĝi ne ekzistis antaŭe) post tri tagoj havis emociajn rilatojn reciprokajn kaj pretecon agi neracie kontraŭ la intereso de la individuo mem sed por la interesoj de la grupo. Sekve membro de grupo (kaj grupo estas minimume du personoj ĝis amaso de personoj – ekzemple nacio) ekposedis post procedo de grupiĝo (sociiĝo) sentojn kiuj ligas lin al la grupo kaj ties membroj neracie. Liaj novaj emocioj kreas el li neracian altruiston, kiu pretas suferi por la grupo aŭ por unuopaj membroj de ĝi.

Karakterizo de la grupeco estas ke ĉiu unuopulo apartenas al multaj grupoj samtempe. Tio estas logika, ĉar se li apartenus nur al unu kaj tiu malaperus, li restus sen grupaparteno, kio ne estas ebla. Se naskiĝas infano, ĝi tuj ekde sia unua minuto iĝas grupano en dupersona grupo kun sia patrino, sed se la patrino mortas dum la nasko iu alia transprenas la infanon kaj ĝi tuj iĝas grupano kun tiu alia persono. Baldaŭ poste aliĝas pli vasta familio, aparte gru-

po kun iu aŭ kelkaj gefratoj, poste kun surstrataj najbaraj infanoj kaj tiuj grupoj ĉiam pli multobligadas. Grupoj en kiuj la unuopulo konas ĉiujn membrojn (malgrandaj grupoj, kiel familio, amikoj, lernejoj, klasoj, infanĝardenaj grupoj,) formiĝas baze de fido. Oni ekkonscias ke oni povas fidi al tiuj homoj kaj oni ankaŭ klopodas esti fidinda. Tio validas ankaŭ por grupeco inter homoj kaj besto(j). Grandaj grupoj al kiuj oni aliĝas en pli posta aĝo kiel urba aŭ regiona, nacia aŭ religia aparteno, formiĝas baze de eduko pri iliaj ideologioj. Oni lernas kiuj estas la valoroj de tiuj grupoj kaj ekkredas ke sen tiuj valoroj ne eblas vivi. Sekve ili baziĝas je kredo akirita per eduko.

Kiam okazis milito en Jugoslavio mi kun mia familio vivis en Kroatio kaj subite la tuta mediaro ŝanĝis sian ĝeneralan edukon. Antaŭe oni edukis nin kaj daŭre laŭdis la grupajn komunajn valorojn de Jugoslavio. Kaj mi efektive kredis al tiuj valoroj kaj sentis mian apartenon al jugoslavia nacio. Ankaŭ al la kroata, sed duarange. Ekde 1990 subite malaperis el la medioj iu ajn valoro de Jugoslavio kaj nun oni parolis nur pri kroateco, pri kroataj valoroj, historio, graveco. Jugoslavio iĝis io tre malbona kaj erara. La klarigo estis ke la antaŭa eduko estis mensoga pro tio ke serboj volis regi super kroatoj nome de Jugoslavio. Mi edukis miajn infanojn por jugoslavia aparteno kaj humanismo (mi estas laŭ la gepatroj kroato, sed mia edzino estas serbino, kio do estas miaj infanoj?). Mi ne kredis al la nova eduko tutsimple pensante jene: Se nur en la vivo de mia patro ŝanĝiĝis en Zagrebo 4 foje la ŝtato kaj ĉiufoje oni asertis ke la antaŭa eduko estis malĝusta, estas tre logike ke ankaŭ la nuna novkroata nacia eduko estas malĝusta, ĉar ankaŭ ĝi iam pasos, des pli ke jam klare vidiĝis ke baldaŭ ĉiuj novaj ŝtatoj ekestintaj post disfalo de Jugoslavio reunuiĝos ene de Eŭropa Unio. Ne volante akcepti novan ideologion kaj apartenon, mi forlasis Kroation. Sed Jugoslavio simple disfalis kaj malaperis. Ĝi plu ekzistis nek en Slovenio nek en Kroatio. Mi ne plu povis esti jugoslavo. Normale mi akceptis la kroatan apartenon, kiun mi havis ankaŭ antaŭe sed aldonis baldaŭ al ĝi la slovenan. Estante

daŭre en Slovenio mi estis sub konstanta influo de slovena eduko, ĉu de medioj, ĉu de homoj kun kiuj mi rilatis. Tiu nova “patrujo” plaĉis al mi kaj mi baldaŭ akceptis slovenecon. Kaj mi estis nun kroato kaj sloveno. Dum la milito homoj en novaj ŝtatoj akceptinte novajn grupanecon forlasis la antaŭan. Oni edukis ĉiujn en Jugoslavio ami aliajn jugoslavojn. Tre baldaŭ ĉiuj forgesis tiun amon kaj pro daŭra verŝado de unuflankaj informoj de sialandaj medioj ekkredis ke iliaj popoloj kaj do ili mem estas en granda danĝero. Kroatoj ekkredis ke serboj volas detrui ilin kaj ekmalamegis la serbojn kaj inverse: la serboj ekkredis ke kroatoj kaj slovenoj kaj muzulmanoj kaj albanoj volas detrui ilin kaj ekmalamegis ilin. Ĉiu el ili funkciis laŭ la skemo EDGK (ekstera danĝero por mia grupo) kaj nome de defendo de sia grupo pretis efektivi la plej terurajn malbonfarojn. Subtenis tion kompreneble ĉiuj kies tasko en la ŝtatoj estas eduko: la lernejoj, medioj kaj pastraro. Kroatoj kredis ke ili sendube pravas, ĉar ili batalas por sia libereco kaj volas liberiĝi de la serba jugo. Serboj kredis ke la 4 popoloj volas detrui ilin kaj ke ili perfidis Jugoslavion kiu estis komuna patrujo al kiu ĉiuj ĵuris defendi ĝin. Por kroatoj estis bona faro se la kroataj soldatoj mortigis la serbojn kaj por serboj estis bona afero se serbaj soldatoj mortigis la kroatojn. Kiu pravis? Kiu faro estas la bona, justa, ĝusta? En konduto de la homoj kaj vivaj estaĵoj ĝenerale tiuj nocioj prezentas nur provizorajn daŭre ŝanĝeblajn valorojn. Ili daŭras tiom longe dum daŭras la aparteno al la koncerna grupo. En Jugoslavio la mortigo de alia jugoslavo estis terura malbonfaro. En la milito tio fariĝis dezirindaĵo. En Kroata kaj Serba ŝtatoj kiuj ne militas, tio iĝas krimo kiun tamen multaj subtenas (ne konsideras krimo) kaj en EU kiam denove ĉiuj eksjugoslavo estis en la sama ŝtato oni instruos la homojn ke estas granda krimo mortigi membron de nia komuna eŭropa ŝtato.

4

PLIAJ NIVELOJ

La demando de la kvina nivelo aperas nur en la konsciaj branĉoj kaj estas malsama por kampoj pri danĝero aŭ kampoj pri potenco: En kampoj de danĝero, se temas pri ekstera forto, ĝi estas: ĈU LA FORTO ESTAS PLI GRANDA OL MIA KONTRAŬFORTO? Kaj por kampoj de ekstera potenco: ĈU LA POTENCO UTILAS? Por kampoj de danĝero, se temas pri interna forto, ĝi estas ĈU LA DANĜERO (BEZONO) ESTAS PLI GRANDA OL TOLERLIMO? Kaj por interna potenco ĈU LA POTENCO (REGADO) UTILAS?

Je la unuaj kvar niveloj okazas nur decidoj ene de intuicia aŭtomatismo kaj ne okazas kemiaj aŭ emociaj ŝanĝoj, kiujn ni sentus. Ekde la kvina nivelo en la konsciaj branĉoj aperas raciaj procedoj kaj emociaj fizikkemiaj procedoj en la organismo, kiujn ni lingve difinas per vortoj priskribantaj sentojn kaj pensojn. Mi serĉas kiuj sentoj aperas post kiu demando/respondo, do mi klopodas ordigi sentojn sence de iliaj funkcioj.

Por povi havi pli facilan superrigardon, necesas akcepti mallongigojn por ĉiu el la niveloj. La unuan disdividon ni nomu EKSTERA FORTO kies mallongigo estu E kaj INTERNA FORTO, kies mallongigo estu I. Je la dua nivelo ni havas disdividon je DANĜERO, kies mallongigo estu D, kaj POTENCO kun mallongigo P. Je la tria nivelo la disdivido okazas je tio ĉu la forto efikas je mi kiel UNUOPULO, sekve la mallongigo estu U kaj je mi kiel GRUPESTAĴO, do la mallongigo estu G kaj fine en la kvara nivelo la disdivido okazas je KONSCIA (K) kaj AŬTOMATA (A) reagado.

Ni komencu per unu el la 16 eblaj konsciaj branĉoj: EDUK, kio signifas, ke ni elektis branĉon kun ekstera danĝero, direktita al unuopulo kaj malrapida (lasanta al ni tempon konsciigi ĝin).

* * *


Mi disdividis la branĉon je du skemoj ĉar la tuta ne povus eniri unu paĝon de la libro. Unue ni vidu la tiel-nomatan RAM-parton, do parton en nia cerbo kiu enhavas memoritajn informojn ricevitajn dum la homa vivo kaj ordigitajn. Tiuj informoj estas komparataj kun la novvenanta informo el la ekstero en la centra decidunuo de la cerbo. Baze de tiu komparo de eksteraj informoj kun la jam memoritaj la centra decidunuo plu starigas demandojn kaj baze de respondoj procedas je pliaj niveloj ĝis ĝi atingas la lastan demand/respondon kaj faras decidon pri reago. Tion ni vidas en la posta skemo EDUK 2.

EDUK 1 montras al ni ke nia RAM memoro rilata al ekstera danĝero konsistas el memoraĵoj kiujn ni akiras lernante de la stokita socia scio (scienco) kaj lernante el propra sperto. Do en EDUK ni komparas eksterajn informojn kun niaj scioj.

EDUK 1


INFORMKOLEKTADO KOMPARATA KUN DATUMOJ

EL RAM-MEMORO:



EDUK 2 – REAGJOJ

(PRO EKSTERA DANĜERO DIREKTITA AL LA SUBJEKTO,
MALRAPIDA – KAŪZANTA KONSCIREAGON)



Kiel videblas, la EDUK-branĉo unue demandas sin (demando de la kvina nivelo) ĉu la ekstera forto venanta al mi estas pli forta ol mia forto defendi min? Tio estas esenca por povi reagi. Per diversaj miaj mezurinstrumentoj (okuloj, oreloj, nazo...) mi taksas tion kaj baze de la rezulto la korpo reagas per iu emocia (neracia) aŭ racia reago. La respondo JES al tiu demando funkciigas racian flankon kiun tamen akompanas sento de timo. Tuj sekvas la demando: Ĉu la danĝero estas ekstreme granda? Jesa respondo kaŭzas memsugeston mekanismon kaj la nea la proceson de pensado. La sekva, sepnivela demando estas: Ĉu la danĝero daŭre kreskas? Jesa demando en branĉo pri memsugestado kaŭzas negativan memsugestadon (la problemo ne estas solvebla), do panikan timegon kaj panikan klopodon fuĝi aŭ sovaĝe sin defendi. Nea respondo donas iom da espero kaj realiĝas pozitiva memsugesto. Mi sugestas al mi pozitivan solvon, mi ekesperas ke iel mi sukcesos venki la problemon kaj mi sovaĝe (kun pli da energio ol oni povus supozi havi en si) atakas la danĝeron por venki ĝin.

En la branĉo je la sesa nivelo kie okazas pensproceso stariĝas same la demando: Ĉu kreskas la danĝero? Kaze de nea respondo mi pensas pozitive kaj decidas ataki la danĝeron, taksante ke ĝi tamen estas venkebla, kaze de jesa respondo mi pensas negative kaj klopodas nur laŭeble bone prepari min por defendo.

En la neracia flanko (kiam la kvinnivela demando havas nean respondon ni sentas iun formon de malkvieto (ekzemple se muŝo volas sidiĝi sur min, aŭ nekonata hundo pasas apude). Sekvas la demando: Ĉu la danĝero kreskas? Kaze de jesa respondo mi ekkoleras kaj atakas (se la muŝo daŭre klopodas ĝeni min, mi klopodas mortigi ĝin) kaj en la kazo de nea respondo, mi havas nur iun ĝensenton pro kiu mi iomete defendas min (svingas mane por forpeli la muŝon).

Eblas do konkludi ke en EDUK-branĉo unue aperas sentoj pri TIMO kaj MALKVIETO (post demando pri PLI aŭ MAPLI granda forto (ol estas la mia), poste aperas la raciaĵoj: PENSADO KAJ MEMSUGESTO post la demando ĉu la forto ekstreme grandas

kaj en la sekva nivelo aperas pozitiva aŭ negativa pensado respektive memsugesto en racia flanko post la demando: Ĉu plu kreskas la forto? Kaj je la neracia flanko post la demando ĉu kreskas la forto aperas sentoj de kolero kaj ĝeno.

Fina rezulto (reago) estas aŭ defendo aŭ atako.

Sur la antaŭa skemo (EDUK 1) mi montris kiel oni akiras la memoraĵojn en la RAM-memoro de nia cerbo rilate al kampo de EDUK. Evidente temas pri du aroj da informoj kiujn ni kolektas kaj arigas en la memoro kaj poste uzas komparante la antaŭe akiritajn memoraĵojn kun la novalvenantaj informoj. RAM-memoro EDUK konsistas el informoj akiritaj per lernado pri sciencoj (do tio kion ni lernas ĉefe en lernejoj pri sciencaj akiraĵoj de la antaŭaj generacioj – esence tiuj sciencaĵoj kiuj helpas pri sindefendo). Alia kanalo por akiri necesajn memoraĵojn venas per sperto pri similaj antaŭaj okazaĵoj (spertoj pri okazaĵoj en kiuj mi estis atakita).


Al tiu ĉi grupo da skemoj apartenas ankaŭ la sekva skemo ĉi-sube: EDUA.

Ĝi montras al ni la situacion kiam la subjekto estas en danĝero pro ekstera forto kiu estas rapida kaj jam tute proksima, do kiam la reago estas aŭtomata (ne konscia). Informoj el ekstero ĉi tie estas komparataj kun memoraĵoj en ROM-memoro, do tiu kiu dum evoluado kreis datumojn kaj evoluigis aŭtomatajn reagojn. Al ROM ni ne povas konscie influi. Ĝi jam estas en ni.

Kiel videblas, tiam ekzistas nur du tipoj de reagoj. Se temas pri plukreskanta danĝero, la reago estas refleksa (oni forsaltas, rapidege movas manon, aŭ alian korpoparton por malebligi la kolizion kun la danĝero aŭ malebligi pluan efikadon de la danĝero (ekzemple kiam oni hazarde tuŝis ion ege varman, oni aŭtomate retiras la manon por ke la domaĝo ne estu pli granda ol ĝi jam estas). Tiu reago estas defenda.


Alia reago estas, se la danĝero ne kreskas. Tiam ni reagas per afekcio, do atako.

Branĉo EDUA
(EKSTERA, DANĜERO, UNUOPULO, AŬTOMATA)




BRANĈO EDGK 1
(EKSTERA DANĜERO DIREKTITA AL MIA GRUPO, MALRAPIDA –
KAŬZANTA KONSCIAN REAGON)

INFORMPRILABORO KOMPARATA KUN RAM-MEMORO



BRANĈO EDGK 2

(REAGOJ AL EKSTERA DANĜERO DIREKTITA AL MIA GRUPO,
MALRAPIDA – KAŪZANTA KONSCIREAGON)



La skemoj EDGK montras la situaciojn kiam la homo funkcias kiel grupestaĵo. Oni sekvas la emociojn kaj raciaĵojn kiuj estas konsekvencoj de la koncerna kondiĉo: kiam grupo (aŭ alia membro de grupo al kiu la persono apartenas) estas en danĝero.

En la skemo EDGK 1 ni vidas nur kiel ekestas la memoraĵoj en la RAM-memoro kun kiuj estas komparataj la informoj venantaj el ekstero kaj baze de tiu komparo la decidunuo plu procedas en la postaj niveloj de demandoj kaj respondoj por fine fari decidon kiel reagi. Do, EDGK-RAM ekestas per unuflanke eduko, kiun efektivigas la ĉirkaŭa socio kaj aliflanke per memeduko – lernante en praktiko kio estas morala kaj kio ne en socioj en kiuj oni vivas. La rezulto estas kredoj pri sociaj ideologioj kaj konfidoj al la socioj en kiuj oni vivas. Tiuj kredoj kaj konfidoj estas elementoj kiuj difinas la bazon de niaj reagoj en kampo EDGK. Per unu vorto temas pri konvinkoj.

EDGK 2 montras al ni postan procedon je niveloj 5, 6 kaj 7 por serĉi la findecidon kiel reagi.

La unua demando (je nivelo 5) estas: Ĉu la danĝero kiu minacas mian grupon aŭ parton de mia grupo estas pli granda ol la forto de la grupo aŭ de tiu grupoparto kiu estas en rekta danĝero? Se la respondo estas jesa min kiel membron de la grupo ekregas timo. Se mia grupo estos pereigita, estos ankaŭ mi, aŭ se iuj partoj de mia grupo estos pereigitaj, ankaŭ mi suferos ĉar mia grupo ne plu povos funkcii kiel ĝis nun. Se la respondo estas NE, min kiel grupanon ekregas malkvieto. La danĝero ne estas granda, sed ĝi tamen povas damaĝi mian grupon. La dekstra flanko de la skemo (kie la danĝero estas pli granda) estas neracia flanko kaj tie ĉio posta estos neracia. La maldekstra flanko estas racia kaj tie la respondoj estas serĉataj laŭ racia pensa vojo.

La demando je nivelo 6 estas: Ĉu temas pri ekstreme granda danĝero?

Se la respondo ĉi tie estas JES, min kiel grupanon ekregas eŭforiemocioj kaj se la respondo estas NE, min kiel grupanon ekregas am-emocioj. Je la 7-a nivelo la demando estas Ĉu la danĝero por la grupo plu kreskas? Se la respondo ĉe eŭforiemocioj estas jesa la rezulto estas ke min kiel membron de grupo ekregas time-

go kiu estas karakteriza ĉe unuopuloj kiuj troviĝas en cirkonstancoj de grupa paniko. Se la respondo estas NE min ekregas eŭforio. Iu malracia stato en kiu mi perdas la timon pro granda danĝero kaj “freneze” atakas tion aŭ tiun kiu la danĝeron kaŭzis.

En la kazoj kiam la respondo je la sesa nivelo (Ĉu ekstrema la danĝero?) la respondo estis nea, stariĝas demando je sepa nivelo “Ĉu kreskas la danĝero?”. Se en tiu kazo la respondo estas jes, ekregas min kiel grupanon la emocioj de amo, emocioj kiuj devigas min oferi min certagrade por la endanĝerigita(j) persono(j) de mia grupo. Mi defendos la grupon, malgraŭ tio ke la forto de la danĝero estas tre granda. Se la respondo estas NE, min ekregas stato de malamo en kiu mi forgesas ĉion krom la malamo al la danĝerkaŭzanto, malamiko, kaj mi ekatakas. Imagu la situacion kiam en milito la malamikoj pli multnombraj subite pro iu kaŭzo decidis retreti. En tiu kazo, (pli forta malamiko, sed la danĝero malkreskas) mi kiel grupano kaptita de malamo kun iu speciala frenezo postkuras la malamikon, kreskas en mi malamo kaj mi nepre volas kapti lin kaj venĝi min pro io kion la malamiko al mi malbonan faris aŭ simple pro timo kiun li kaŭzis en mi.


En la racia flanko, kiam je la demando de la kvina nivelo (Ĉu la danĝero pli grandas?) la respondo estas NE, do la danĝero estas solvebla, unue aperas malkvieto. Se je la sekva sesa-nivela demando “Ĉu la danĝero kreskas?” la respondo estas jesa, mi kiel grupestaĵo pensas kiel malebligi la danĝeron per atako dum en la kazo kiam la respondo estas nea mi pensas kiel malebligi la danĝeron per defendo.

Se temas pri tre rapida kaj proksima danĝero por mia grupo, ni troviĝas en stato EDGA (ĉi-sube).

En tiu ĉi kazo nia reago estas aŭtomata kaj povas esti nur du formoj de tiu reago. Se la danĝero daŭre kreskas, sekve mi ne povas helpi al aliuloj de mia grupo kiuj estas en danĝero, en mi kiel grupestaĵo kreskas kompato kaj se la danĝero malkreskas, tiam mi kiel grupestaĵo estas kaptita de kolero kaj atakos la danĝeron kiu minacas al aliuloj eĉ se mi mem pro tio pereos aŭ havos damaĝon.


BRANĈO EDGA

(EKSTERA DANĜERO AL MIA GRUPO, RAPIDA – PROVOKANTA
AŬTOMATAN REAGON)




BRANĈO EPUK 1

(EKSTERAJ INFORMOJ PRI POTENCO KOMPARATAJ KUN RAM-MEMORO)



EPUK 2

(REAGOJ JE EKSTERA POTENCO DIREKTITA AL UNUOPULO,
MALRAPIDA – KAŪZANTA KONSCIREAGON)



EPUK-branĉo rilatas al situacio kiam ekstera forto ne direktis sin al la subjekto (unuopulo), sekve ĝi montras al la subjekto nur sian povon, potencon danĝeron. La skemo EPUK 1 montras kiel kreiĝas la RAM-memoro, ĉe la homo en parto de la cerbo en kiu oni memoras kaj lernas pri antaŭaj okazadoj por povi lerni pri la estonto. Ĉar ĉi tie temas pri potenco, rego, EPUK memoro rilatas al lernelementoj el la filozofiaj kaj religiecaj konceptoj de la sagaculoj kaj el la observado de la agado de la potenco. Lernado de la sagaculoj (tio povas esti patro aŭ avo, religiinstruisto aŭ onklo, poste instruistoj en lernejoj, kiuj transdonas al la homo sciojn el filozofia kaj religia kampo) kondukas al scio pri la sociaj rilatoj dum la observado de la potenco signifas atestadon per kiu ni lernas. La rezulto estas lernitaj kutimoj kiuj difinas nian konduton en socio.

EPUK 2 montras al ni la kvinan, sesan kaj parte sepan nivelon de demando-respondoj baze de kiuj la subjekto decidas reagi al la informoj el ekstero. Kiel videble, je la kvina nivelo, la demando estas: Ĉu la potenco estas utila por la subjekto (por la unuopulo)? Se la respondo estas JES, la plua procedo kondukas al neracia flanko en kiu la responda emocio estas ESTIMO. Se do la potenco utilas al mi, mi estimas ĝin. La demando je la sesa nivelo estas “Ĉu la potenco permesas, stimulas la funkciadon de la subjekto (unuopulo)?”. Se la respondo estas JES, la subjekto fieras pri la potenco (kiu regas super la subjekto), kiu permesas al ĝi evolui kaj agi. Se la respondo estas NE, la subjekto sentas malagrablon (estimas la potencon kiu utilas al li sed sentas malagrablon, ĉar ĝi malpermesas al li agi tiel kiel li ŝatus. Je la sepa nivelo la demando estas “Ĉu la ideologio de la potenco similas al la ideologio de la subjekto? Ja en EPUK-branĉo ni troviĝas en la kampo de rego- kaj potencrilatoj, do ĉi tie la rolon havas ideologio per kiu oni edukas subjektojn. Se la respondo en flanko FIERO estas JES, la subjekto sentas fidelecon kaj agas plene obee al la potenco. Li estimas, fieras kaj fidelas. Se la respondo estas NE, la subjekto sentas seniluziigon kaj kontraŭstaras la postulon de la potenco. Kiam je la sesa nivelo

la respondo estas NE kaj la subjekto sentas malagrablecon, je la demando de sepa nivelo (Ĉu la ideologioj similas?) al la jesa demando la subjekto sentas kulposenton kaj obeas al la potenco kaj al la nea respondo (niaj ideologioj ne similas) la subjekto SPITAS kaj malobeas.


Kiam je la demando de la 5-a nivelo (Ĉu la potenco estas utila?) la respondo estas NE, la procedo iras al RACIA flanko kaj la unua reago estas MALESTIMO. Se la potenco kiu volas regi vin, estas por vi malutila, vi reagas per malestimo al tiu potenco. Al la demando de la 6-a nivelo (Ĉu permesas, stimulas?) kaze de jesa respondo la subjekto reagas per racia konsento kun la postulo de la potenco kaj obeas dum en la kazo de nea respondo la subjekto malkonsentas kun la potenco kaj reagas malobee.

Kiel oni povas vidi, en la racia flanko rezulte oni havas raciajn reagojn (konsenti aŭ ne konsenti) dum ĉe la neracia flanko en la fino oni havas neraciajn emociojn: fidelo, seniluziiĝo, kulpo kaj spito. La fina rezulto ĉiam estas aŭ obeado aŭ malobeado.

La aŭtomatan reagadon post la kvara nivelo (kiam la potenco estas rapida) montras al ni la suba skemo de branĉo EPUA. Tie stariĝas nur unu plia demando: Ĉu la potenco permesas (stimulas) la agadon de la subjekto? Se la respondo estas JES la subjekto reflekse obeas kaj se la respondo estas ne, la subjekto afekcie malobeas.


Branĉo EPUA

(EKSTERA POTENCO EFIKANTA AL UNUOPULO, RAPIDA –
KAŪZANTA AŬTOMATAN REAGON)




Branĉo EPGK 1

(RAM-MEMORO EN KAZO DE EKSTERA POTENCO EFIKANTA
AL MIA GRUPO, MALRAPIDA)



BRANĈO EPGK 2

(REAGOJ JE EKSTERA POTENCO DIREKTITA AL MIA GRUPO,
MALRAPIDA – KAŪZANTA KONSCIREAGON)



La branĉo EPGK similas laŭ siaj efektoj al la subjekto kiel la antaŭa branĉo EPUK. Temas ja pri efiko de ekstera potenco, sed ne direktita al la individuo sed al grupo en kiu li membras. La RAM-memoro (skemo EPGK 1) ekestas el religia kaj ideologia edukado kiu pere de dogmoj kreas kredojn kaj konvinkojn unuflanke kaj aliflanke la subjekto mem edukiĝas observante la konduton de aliaj en la grupo kaj akiras proprajn sciojn.

La skemo EDGK 2 montras al ni la reagojn kiuj rezultas tra la procedo post demando-respondoj je 5-a, 6-a kaj 7-a niveloj. La demando je la kvina nivelo estas “Ĉu la potenco utilas al mia grupo?”. Respondo JES kondukas nin al neracia flanko kaj provokas la ESTIMON al tiu potenco (kiu utilas al mia grupo, do regas bone por mia grupo). Je la sesa nivelo la demando estas Ĉu la potenco permesas (stimulas) la agadon de mia grupo? Se la respondo estas JES, la subjekton ekregas ENTUZIASMO, ĝi entuziasmas pri potenco kiu ja utilas al lia grupo kaj permesas al ĝi aktivi kiel ĝi ŝatas. Kaj se la respondo estas NE, la subjekton ekregas MALENTUZIASMO (ja la potenco utilas, sed malpermesas al ni fari tion kion ni dezirus). Je la sepa nivelo troviĝas la demando: Ĉu la ideologio de la potenco similas al la ideologio de mia grupo? Se la respondo en kazo de ENTUZIASMO estas JES, la subjekton ekregas ADORO al la potenco kaj ĝi pretas absolute, senkritike obei. Se la respondo estas NE, la subjekto sentas seniluziigon kaj malobeas.

Kaze de MALENTUZIASMO je la 6-a nivelo stariĝas denove la demando: Ĉu similas la ideologioj de la potenco kaj la grupo de la subjekto? Se la respondo estas JES, la subjekto ekŝatas la potencon kaj obeas kaj se la respondo estas NE, la subjekto ekmalŝatas la potencon kaj malobeas ĝin.


Se je la 5-a nivelo al la demando pri utilo la respondo estas NE (la potenco estas malutila por la grupo) la procedo iras al racia flanko kie je la demando de la sesa nivelo “Ĉu la potenco permesas, stimulas la agon de mia grupo?” povas esti jesa aŭ nea respondo. Kaze de JESA respondo la subjekto racie decidas toleri la poten-

con kaj obei ĝin dum en la kazo de NEA respondo (la potenco ne permesas la agadon de mia grupo) la subjekto maltoleris la potencon kaj malobeas ĝin.

La posta suba skemo EPGA montras la reagojn aŭtomatajn, kiuj estas rezulto de potenco ekstera kiu efikas al la grupo de la subjekto sed estas tuj-ĉeesta (rapida). Je la demando “Ĉu ĝi permesas, stimulas?”, la respondo JES kaŭzas refleksan obeon de la subjekto kaj la respondo NE afekcian malobeon.

EPGA

(EKSTERA POTENCO EFIKANTA AL GRUPO, TUJA –
KAŬZANTA AŬTOMATAN REAGON)




Rilate la kompletan kampon de INTERNA FORTO (sekve, kiam ni observas la subjekton, ĉefe la homon, kiel forto mem kiu agas je si mem kaj je la ĉirkaŭo), mi ne prilaboris pli detale la RAM-memoron kaj la aŭtomatajn reagojn, sed nur la reagan flankon de la konsciaj kampoj. Temas pri 4 kampoj (IDUK, IDGK, IPUK kaj IPGK).

Mi tamen diru ke la kolektivan parton de la eduko, kiun akiras la homo per organizita socia influo (lernejo) por la 4 sekvaj kampoj, kreas la jenaj kolektivaj edukinstruaj akiraĵoj: La RAM memoron de IDGK konstruas statistika psikologio kaj statistika sociologio, de IPGK eksperimenta sociologio kaj abstrakta arto, de IDUK eksperimenta psikologio kaj medicino kaj de IPUK formala arto (neabstrakta) kaj logiko. Iom pli pri tio en la lasta ĉapitro.

Kaj nun la reagoj de la 4 kampoj je la 5-a kaj 6-a niveloj.

REAGOJ DE BRANĈO IDUK

(INTERNA FORTO, DANĜERA POR LA SUBJEKTO, MALRAPIDA)



Kiam temas pri la subjekto kiel forto (Mi mem estas forto kiu agas), la unua estas kampo IDUK. Tio signifas ke la subjekto kiel forto estas direktita al si mem (sekve estas danĝera por si mem). Ĉe homo temas pri internaj bezonoj kiel malsato, soifo, doloroj, bezono feki, pisi, seksumi... Tio estas indikoj kiuj signalas al la subjekto ke li devas kontentigi certan bezonon (alokaze okazas danĝera evoluo por la subjekto).


La demando de la 5-a nivelo estas: Ĉu la bezono (malsato, soifo, jukemo...) estas pli granda ol la tolerlimo? Temas pri tio ke oni povas dividi la bezonstaton je tolerebla premo (mi estas malsata sed ne ankoraŭ tiel ke mi devus tuj manĝi, mi sentas la bezonon pisi, sed mi ne devas fari tion tuj) kaj la stato en kiu ne plu eblas toleri la premon, oni devas kontentigi la bezonon tuj).

Se la respondo al tiu demando estas JES (La bezono estas pli granda, oni devas tuj kontentiĝi), la sekva procezo okazos en neracia flanko. Aperas tre fortaj premsentoj, kiuj ne estas plu longe elteneblaj. Je la sesa nivelo aperas la demando: Ĉu la forto kreskas plu? Se jes, oni devas tuj kontentiĝi kaj se io malebligas tion, oni agas agrese por realigi la kontentiĝon. Se la forto ne kreskas, oni povas ankoraŭ mallonge toleri ĝin.

Se la respondo al la unua demando estas NE, la procedo restas en la racia flanko. Aperas malfortaj premsentoj (malsato ankoraŭ malforta, soifo komenca, neforta doloro...). La sekva demando estas: Ĉu la forto kreskas? Se JES, oni serĉas racie pensante la manierojn kaj konvenajn kondiĉojn por povi kontentigi la bezonon. Aperas sopirsentoj kaj oni serĉas manieron kontentiĝi. Se la respondo estas NE, aperas avertaj sentoj kiuj ankoraŭ ne postulas tujan agon por atingi kontentiĝon, do oni toleras la postulon de la bezono.

REAGJOJ DE BRANĈO IDGK

(INTERNA FORTO, DANĜERA POR LA GRUPO DE LA SUBJEKTO, MALRAPIDA)



La reagoj en la kampo IDGK rilatas al tio ke la subjekto mem kiel forto direktis sin al sia grupo kaj tio prezentas danĝeron por la grupo kaj la subjekto. Temas fakte pri la bezono de subjekto (individuo) esti en socio, aparteni al socio. La sento de manko de tiu bezono estas soleco.

Sekve la demando de unua nivelo estas: Ĉu la forto de la subjekto mem estas pli granda ol la tolerlimo de la bezono esti en societa, ĉu la bezono estas trans la limo de solectolero?

Se la soleco estas pli granda ol la tolerlimo, ni troviĝas en la flanko NERACIA kaj sentas fortegan solecon neelteneblan. La demando je la sesa nivelo estas: Ĉu tiu forto plu kreskas? Se jes (la problemo de soleco ne estas solvita) ni sentas malesperon kaj agas malespere por eniri iun societeton kaj havigi al si kunsocietanon.

Se la respondo estas NE (do, la problemo estas solvita), la subjekto sentas FELIĈON kaj kvietiĝas.


En la kazo ke la respondo al la demando de la kvina nivelo (Ĉu la soleco superis la tolerlimon) estas NE, ni troviĝas en la RACIA flanko kaj la subjekto sentas malfortajn solecpremojn. Je la demando de la sesa nivelo "Ĉu la forto plu kreskas?" (la problemo ne estas solvita), oni sentas ANGORON kaj oni agas racie (pensante) kun la celo esti akceptita en iu societo, gajni iun amikon.

Se ankaŭ ĉi tie la respondo estas NE (do, oni solvis la problemon) oni sentas ĝojon pro la solvita problemo kaj la rezulto estas kvietiĝo.

Ie je pli postaj (oka, naŭa...) nivelo devus esti ankaŭ demando post kies negativa respondo estus memmortigo.

REAGJOJ DE BRANĈO IPUK

(INTERNA POTENCO, DIREKTITA AL LA SUBJEKTO, MALRAPIDA:
BEZONO PRI REGADO DE LA SUBJEKTO SUPER SI MEM)



IPUK estas branĉo en kiu la subjekto mem ne estas direktita al si mem, do ne prezentas danĝeron, sed prezentas potencon. Potenco super si mem estas efektive bezono regi sin mem.

La demando je la kvina nivelo estas: Ĉu la rego utilas al la subjekto? (al mi mem). Se la respondo estas JES, la posta procedo okazas en racia flanko. La sento ĉe tia respondo estas KONTENTO pri si mem, do kontento ke oni uzas povon utilan al si mem. La sekva demando estas Ĉu la potenco permesas (stimulas) la agadon? Se la respondo estas JES, aperas ĝuosento rilata al respondeco agi sence de la utilo kaj do la rezulto estas kreiva laboro, krea produktiveco. Se la respondo al la sesa nivelo (Ĉu ĝi permesas?) estas NE, signifas ke la propra potenco ne permesas, sekve malpermesas la deziratan aktivadon. Tio kaŭzas senton tamen aktivi laŭ la postulo de la potenco, sed ne pro ĝuo, sed pro devosento malgraŭ la malemo fari tion.


La rezulto estas nekrea laboro.

Se la respondo al la demando de la kvina nivelo (Ĉu utilas la potenco al la subjekto?) estas NE, la procedo okazas en NERACIA flanko, kaj la unua sento reaga estas MALKONTENTO PRI SI MEM (mia regmaniero ne estas utila al mi!).

Sekvas la demando de la 6-a nivelo: Ĉu ĝi permesas, stimulas mian agmanieron? Se ĉi tie la respondo estas JES, la reaga sento estas ĝuo povi kreadi sen respondeco kaj la rezulto estas LUDADO. Se la respondo estas NE, do la propra potenco nekontenta pro si mem malpermesas mian manieron agi, mi reagas per devosento pro timo kaj mi laboras kontraŭ mia volo, pro devigo.

REAGJOJ DE BRANĈO IPGK

(ĪTERNA POTENCO, DIREKTITA AL LA GRUPO DE LA SUBJEKTO,
MALRAPIDA: BEZONO PRI REGADO SUPER ALIAJ)



La branĉo IPGK montras al ni la manieron reagi (kondukti) kiam la subjekto estas en pozicio regi grupon (regi grupon povas signifi havi potencon super siaj infanoj aŭ super sia hejmbesto, sed ankaŭ esti reĝo de iu popolo).

Ĉiu subjekto troviĝas ankaŭ ofte en tiu pozicio, samkiel la reĝo troviĝas ankaŭ en aliaj neregaj pozicioj.

Sekve la skemo montras ke la demando je la kvina nivelo estas: Ĉu mia reĝo utilas al la regatoj? Se la respondo estas JES, la procedo sekva estas en la kampo RACIA kaj ni unue sentas FIERON (pro sukcesa regado). La sekva demando (je la sesa nivelo): Ĉu la subjekto permesas al la regatoj aktivi laŭ ilia deziro (stimulas ilin vivi laŭ kontentiga maniero)? Se la respondo estas JES: la subjekto sentas ĝuon kaj kiel reganto faras decidojn je krea maniero, profunde pensante. Se la respondo estas NE (kio signifas, ke li malpermesas al la regatoj fari laŭ ilia plaĉo), li sentas malkontenton pro malsukcesa reĝo – ĉar li devis ion malpermesi kaj li faras decidojn ne kun kreiveco kaj kontraŭvole.

Se al la demando “Ĉu la reĝo estas utila?” la respondo estas NE, la procedo estas en NERACIA FLANKO de nia konduto. Reage ni ne plu estas fieraj, sed ni ŝatas atingi la gloron, ni reagis per glormo. Sekvas la demando Ĉu la subjekto permesas al la regatoj agi laŭplaĉe. Se la respondo estas JES, li malkontentas ke li devis cedi al la regatoj kaj li faras kontraŭvolajn decidojn. Se la respondo estas NE, (do li ion malpermesis), li ĝuas pro potenco uzata kaj faras kreivajn decidojn pro spito, li regas per la rimedoj de la puno).

5

VIVEKZEMPLOJ

Por praktike doni nur ilustrajn ekzemplojn de tio kiel la homo kiel subjekto de la sistemo prezentita funkcias/konduktas mi montros kelkajn hazardajn situaciojn en la vivo.

La homo daŭre reagis al la ĉirkaŭaĵo kaj al siaj internaj bezonoj kaj daŭre transpasas el stato de MI (individuismo, unuopeco) al stato de NI (grupeco) kaj inverse.

Jen simpla ekzemplo.

Johano estas malsata (interna bezono – stato de MI) kaj preparas al si la manĝon. Li sidiĝas ĉe la tablo kaj manĝas. Apude troviĝas funkcia televidilo. En iu momento li aŭdas novaĵon, ke iu eksterlanda politikisto ofendis lian popolon (tiun de Johano) kaj li ekscitiĝas, ĉesas manĝi kaj iras pli proksimen al la televidilo aŭdi pli detale la novaĵon (stato de NI, en kiu ne plu gravas lia MI-bezono manĝi, kontentigi la korpon). Post la novaĵo li rememoras pri la malsato kaj revenas manĝi. Subite li aŭdas krion de la edzino el la kuirejo. Li senpripense eksaltas kaj kuras al la kuirejo ĉar denove li reagis al sia NI-emocio, stato de grupeco. Ne gravas plu la manĝo, eble la edzino bruligis sin aŭ vundis per tranĉilo. Li devas helpi al ŝi. Montriĝas ke ĉio estas en ordo kaj li revenas al la tablo (ŝanĝo de stato al MI-stato). Li ĉesas manĝi (al la korpo sufiĉas, la malsato malaperis) pro la MI-stato de la korpo. Li iras al la televidilo (pro la MI-stato de scivolemo pri la filmo komenciĝanta. Li ekrigardas la filmon kaj ekinteresiĝas pri la intrigo, la sortoj de la ĉefrolantoj. Li eksentas la apartenon kun tiuj homoj de la filma dramo kaj li enviviĝas en la enhavon sentante fortan ligan al la herooj. Pro tio li suferas kaj empatias kun iliaj suferoj kaj problemoj

(li transiris al NI-stato – grupeco). Ĉar li mem ne povas helpi li sentas fortajn kompat-emociojn, eble li eĉ esploras. En tiu momento li eksentas fortan bezonon pri necesejo (iri feki). Li tuj forgesas la filmon kaj iras al la necesejo (MI-stato de korpa bezono).

Temas pri unu ilustrado de daŭra ŝanĝado inter individuaj bezonoj (MI-stato) kaj bezono aparteni al grupoj (NI-stato). Tiu grupaparteno povas esti mallonga aŭ daŭra. En la kazo de televida identiĝo kun la rolantoj temas pri mallonga grupaparteno (kiu post la filmo iom post iom malaperos) kaj en la kazo de aparteno al la popolo temas pri longa aparteno, same al familio ktp.

Alia ekzemplo pri tio kiel homo agas kadre de NI-sento (altruismo). La homo ne apartenas al unu grupo sed al multegaj samtempe. Kiel batali aŭ kunhelpi al ĉiuj grupoj al kiuj unuopulo apartenas (grupoj de amikoj, de familio(j), de nacio, de religio...)? Ne eblas samtempe. La homo kiel altruisto (NI-stato) reagas ĉiumomente nur al tiu danĝero kiu en tiu momento minacas iun el liaj apartenecoj (socioj, grupoj). Se iu volas bati mian infanon, mi ne zorgas pri problemoj de mia nacio aŭ de amikoj aŭ de miaj samurbanoj. Mi reagas al danĝero nun minacanta membron de mia familio. Sekve, oni sentas forte sian apartenon nur al tiu grupo kiu momente estas en danĝero. Plia ilustrado pri tio: Dum la milito estis farita enketo inter kroatoj ĉu ili pretas oferi la vivon por sia patrujo (Kroatio). Estis 85% da tiuj kiuj jesis. Dek jarojn post la milito al la sama demando nur 15% da kroatoj respondis jese. Nun la popolo ne plu sentas danĝeron kaj oni ne sentas tiun apartenon same forte kiel iam.

Sed ofte konfliktas du aŭ pluraj el la apartensentoj de unuopulo kaj tio kaŭzas traŭmatojn. Ekz. en la milito konfliktas grupaparteno al la familio kaj tiu al la nacio. La ŝtato volas igi vian filon soldato kaj sendi lin al la fronto, do elmeti lin al danĝerego, stato en kiu li povas morti. Tio neniel koincidas kun la interesoj de via familio. Vi volas savi vian filon kaj kaŝi lin aŭ foririgi lin al alia lan-

do sen milito. Samtempe kiel membro de via nacio vi volas ke via popolo venku la malamikojn, ĉar via popolo troviĝas en danĝero. Tiu apartensento al la nacio devigas vin sendi la filon al la armeo. En tiaj konfliktaĵaj situacioj unuopulo devas decidi ĉu pli gravas unu aŭ alia el viaj apartenoj. Se ĉe vi evoluis tre forta nacia sento baze de eduko kaj konvinkoj, vi sendos la filon al la armeo. Se pli fortas via aparteno al via familio, vi klopodos kaŝi la filon kaj savi lin.

Sed ne konfliktaĵas nur diversaj apartenecoj inter si. Konstante okazas ke konfliktaĵas grupeco (NI-forto) kun individueco (MI-forto). Ekz. vi bezonas feki (MI-forto) sed vi estas surstrate kaj via MI-forto tuj estas ŝanĝita de NI-forto, kiu diras ke tion oni surstrate ne rajtas. La NI-forto pli fortas, sed daŭre ĝin ŝanĝas MI-forto kiu diras ke necesas feki. NI-forto kontraŭstaras sed kiam en tia konstanta interŝanĝiĝado de statoj superas la MI-forto vi iom kaŝiĝetas malantaŭ la angulo aŭ kuras en iun pasejon kaj fekas tie kie la NI-forto kontraŭstaras.

Interesa ekzemplo por tiuj plurapartenoj povas esti fenomeno de publiko ĉe futbalmatĉoj. La publiko ne ludas, sed ili emocie estas ligitaj al la grupo kiun reprezentas la teamo. Kiam temas pri ludo de via loka teamo kontraŭ teamo de alia konkurenca urbo, tiam via teamo kaj ĝia publiko defendas sian lokan (urban) apartenon. La sportistoj reprezentas soldatojn kaj la publiko la ceteran popolon kiu subtenas ilin. Kaj la emocioj estas tre fortaj, speciale se la kontraŭulo estas tre bona aŭ pli-malpli egala, ĉar komence oni ege timas pri malvenko. Kiam via teamo atingas golon, la emocio de feliĉo estas granda. En tia stato individuoj el la publiko apartenantaj al via urbo pretas interbatiĝi kun la publiko de rivaluloj, ĉar ja en la danĝero estas aparteno al sia urbo pri kiu ĉiu fieras. Kelkajn tagojn poste ludas la sama teamo kontraŭ iu alilanda teamo. Tiam ambaŭ publikoj kune emocias por via teamo kaj reciporke sin brakumas kaj kunkantas kaj feliĉas se la teamo venkas. Kial subite hieraŭaj malamikoj estiĝis amikegoj? Ĉar en tiu ĉi kazo ne plu estas en danĝero ĉies aparteno al sia urbo sed al komuna nacio kaj ambaŭ publikoj apartenas al la sama nacio.

Rilate la grupapartenojn necesas diri ke ne nur ĉiu el ni havas multajn identecojn sed ke ankaŭ la forto de ĉiu identeco estas tre diferenca. Ni ilustru tion per jena ekzemplo:

Homo kiu iĝis soldato en milito ne pro sincera kredo pri sia nacio sed ĉar li loĝis en lando kiu lin devigis (eble li devene ne estis naciانو de tiu lando), kaj do li iĝis soldato kontraŭ sia volo, restos en la milito pli egoisma ol altruisma. Lia apartensento ne estas forta. Se oni ordonos al li mortigi 100 militkaptitojn, li komprenos ke tio ne estas bona por li persone, ĉar iam post la milito oni rekonos lin kaj punos pro lia faro. Li tial klopodos ĉiamaniere ne plenumi la ordonon aŭ mortigi laŭeble malmultajn. Aliflanke, homo kun fortega apartensento, kiu fortege kredas ke lia nacio estas super ĉio, senprobleme je ordono ĵetos atombombon al iu plurmiliona urbego kaj pro bono de sia popolo mortigos centmilojn da senkulpaj homoj.

Tiuj ekzemploj montras ke homo ne estas per si mem aŭ altruisto aŭ egoisto sed ni ĉiuj daŭre pasas de unu stato al alia depende de cirkonstancoj kadre de la strukturo ĉi tie priskribita. Tiel okazas ke foje homo kaŭzas teruran krimon pro egoismo (mortigas pro mono aŭ seksperfortas) kaj alikaze terure krimas pro altruismo estante konvinkita ke tiu krimo estas grava ago rilate la defendon de la propra grupo (ekz. militkrimoj).

Inverse, homo faras pozitivaĵojn pro la propraj egoismaj bezonoj, kontentigante ilin per lernado kaj zorgante ke li vivu longe ne endanĝerigante iun ajn per kio li efektive subtenas la grupon tiel ke per sia ekzisto li kunpartoprenas en ĝia vivo kaj ĉar li plikapabligas sin li estas pli utila. Aliflanke kiel altruisto li povas fari heroaĵojn savante aliajn homojn el danĝero metante sin mem en danĝeron aŭ simple kontribuante per sia nepagata laboro kaj kontribuado al grupo.

Tial estas logike ke homoj povas kunvivi daŭre kun sia konflikta historio ne vidante kontraŭdirojn. Ekz. dum milito iu torturis malamikajn soldatojn kredante ke tio estas necesa kaj bona por lia

nacio. Post la milito li trovas amikojn inter personoj de tiu nacio kies membrojn li plej kruele suferigis kaj mortigis.

Okazis al mi foje la jeno: Mi marŝis surtrotuare kaj antaŭ mi iu juna sinjorino puŝis ĉaron kun etinfano kaj apude marŝis alia iom pli granda infaneto. Subite la radoj de la ĉaro inversiĝis kaj ŝi ne plu sukcesis puŝi la ĉaron. Ŝi kelkfoje provis repoziciigi la radojn al la ĝusta pozicio per flankenpuŝado sed ne sukcesis. Mi en tiu momento estis apud ŝi kaj sen iu ajn pensado, tute aŭtomate, mi ekkaŭris, permane korektis la pozicion de la radoj, restariĝis, ekridetis al ŝi kaj daŭrigis mian vojon. Evidente temas pri situacio de aŭtomata reago, helpo al alia en iaspeca danĝereta pozicio. Mi evidente ekhavis kompaton kaj helpis. Sed ŝajne la afero kontraŭdiras ĉi tiujn teoriojn. La sinjorino kaj la infanoj estis al mi nekonataj, do ne apartenis al “mia grupo”. Mi klarigas tion jene: La homo (kaj ankaŭ aliaj estaĵoj, bestoj...) sentas ke li/ŝi apartenas ne nur al homoj kun kiuj li vivis sed ankaŭ al homoj tute fremdaj kiuj estas senpovaj kaj ne mem endanĝerigas lin aŭ lian grupon. Tiaj situacioj estas oftaj en la vivo. Savi malamikan infanon aŭ senpovan malsanulon estas pli-malpli normala afero, savi nekonatojn en mortdanĝero (ekzemple se iu dronas kaj nekonata homo saltas en la akvon por savi tiun ktp).

Interesa ekzemplo estas mia rilato al mia patro kiam mi estis infano. Li estis tre justa kaj severa. Li tre ofte batis min punante pro aferoj kiujn li malpermesis, sed li ankaŭ ofte laŭdis min, kiam mi faris ion bonan. Kaj li estis tre konsekvenca en tio. Por la sama malpermesitaĵo mi ĉiam gajnis la saman porcion da puno. Kaj la patron mi adoris. La patrino neniam batis min sed reagis nekonsekvenca. Kaj ŝin mi ne adoris. Kiel eblas? La skemo EPUK klarigas tion. La ekstera potenco (rego super mi) estis la patro kaj li regis min kiel unuopulon. La demando je kvina nivelo stariĝas: Ĉu tiu potenco (regpovo) estis utila por mi? Evidente tre utila ĉar mi sentis ke li tre bone edukas min, ke li montras al mi la vojon al

la socio klare difinante kio estas permasata, kio ne. El tio sekvas mia estimo al li. La dua demando estas: Ĉu tiu potenco permesas al mi ion aŭ malpermesas. Nun la respondo estas foje nea, foje jesa. Kiam li laŭdis min, li permesis ke mi tiel plu konduku kaj agu. Tiam mi fieris. Kiam li malpermesis (punis min), tiam mi spitis. La lasta demando estas Ĉu ideologie li similas al mi. Kompreneble ke jes, ĉar li ja edukis min kaj mia ideologio estis lia ideologio. Kaj en la kazo kiam la dua respondo estis jesa, post la tria aperis rezulte la adorsento en mi por li.

Kiam oni komprenas tiun simplan fakton, ke ĉio kaj ĉiu daŭre ŝanĝas statojn depende de internaj kaj eksteraj faktoroj kiuj agas al ni, oni komprenos ke ankaŭ la ĝenerala makrosistemo tiel funkcias. Foje mi aŭskultis ĉe radio intervjuon kun grava makroekonomikisto, kiu asertis ke ja idealismaj klopodoj krei ekonomikajn sistemojn baze de altruismo malsukcesis kaj la nura natura sistemo estas ekonomika sistemo bazita je homa naturo de avideco – do la nuna kapitalisma sistemo; mi refoje miris pri la homa blindeco. Eĉ la plej edukitaj fakuloj ne komprenas ke kaj la egoismo kaj la altruismo estas naturaj kaj ke ili daŭre interŝanĝiĝas depende de tio kiuj estas la influoj al la socio. Nek la kapitalismo, nek la socialismo estas per si mem naturaj aŭ malnaturaj. Tutsimple foje la socio reagis per sistemo egoisma pro la eksteraj kaj internaj fortoj kiuj al ĝi efikas kaj foje per socio altruisma.

6

KROMAJ PRINCIPOJ

1. **Principo de ekonomieco** postulas ke kiam io ripetiĝas plurfoje en la samaj kondiĉoj, tio aŭtomatiĝas kaj sekve transiras el konscia programo en la aŭtomatan (ekz. Mi pasas ĉiutage tra mallarĝa pasejo kaj preskaŭ ĉiam mia kruro kolizias al iu breto. Komence mi ĉiam sentis fortan doloron, sed ĉar neniam tiuj batoj kaŭzis iun komplikaĵon, la korpo al kutimiĝis al tiu koliziado, kaj transmitis la situacion al aŭtomatismo. Ĝi ne plu reagis per doloro. Mi plurfoje poste miris kial mi havas bluaĵon sur la kruro ne havante konscion ke mi estis iam batita.) Sed okazas ankaŭ inverse. Se ŝanĝiĝas kondiĉoj ĉe iu programo okazanta en aŭtomata sfero ĝi transiras al konscia parto. Ekz. la spirado estas aŭtomata, ĉar normale aero estas ĉiam ĉirkaŭ ni, sed se ni troviĝas sub akvo, la aero ekmankas kaj la spirado fariĝas konscia afero, oni klopodas konscie solvi la problemon.

2. **Troaj resursoj:** Kiam la bezono troviĝanta en konscia programo havas por kontentigo de la bezono pli da bezonaĵoj ol necese (ekz. oni havas tro multan manĝaĵon) ni troviĝas antaŭ nova SE-disbranĉiĝo kiu kondukas nin al alternativoj: a) voli manĝi pro ĝuo, kvankam sen bezono, kio kondukas al dependo aŭ b) esplori novajn kampojn nekonatajn. Ekz. se oni havas bezonon liberiĝi de psikaj problemoj, oni a) trinkos alkoholon aŭ prenos drogon por forgesi, aŭ b) klopodos serĉi racian solvon por la problemoj, esplori novajn vojojn.

La vivestaĵoj ŝatas travivi sentojn de supera ĝuo, sentojn de feliĉo, de orgasmo. Sed tiuj sentoj aperas nur post sentoj de manko. Se

mankas al homo manĝo kaj li tre malsatas, li sentas des pli grandan ĝuon ju pli granda estis la negativa sento de malsato. Feliĉo estas sekvo de manko je nivelo de grupeco. Ju pli granda la danĝero en kiu troviĝas la propra grupo des pli granda eŭforia feliĉsento, post kiam la danĝero estas venkita. Tial la sportaj konkuroj, aparte se temas pri teamaj sportoj, artefarite provokas la timon (negativan senton), des pli grandan, se la kontraŭula teamo estas forta. La publiko venas al la matĉo plena je timo pri ebla malvenko (ekstera danĝera forto efikanta al mia grupo: EDGK). Kaj se la propra teamo sukcesas venki, ili travivas fortegan eŭforian plezursenton, iaspecan spiritan orgasmon.

Sekve per tiaj sportaj aranĝoj oni artefarite kreas danĝeron por la grupaparteno (kio anstataŭas la militon) pro kio la homoj travivas emociojn de timo kio estas kondiĉo por eventuala fortega emocio dezirata. Tio evoluigas spiritan dependon samkiel drogoj kaj alkoholo stimulas fizikan dependon.

7

KIEL SISTEMIGI LA MONDON

La analogia studo de la homa mondkompreno estas ebla, se ni ordigas la RAM-memorojn, kiuj establiĝas en la homa cerbo kiel segmentokampoj kun kies enhavo kompariĝas la enirantaj informoj el ekstero. Mi jam apudmetis ĉe ĉiu el la unuaj 4 konsciaj branĉoj apud la RAM-memoro du scienco-kredkampojn kiuj difinas unuopan RAM-memoron. Ĉiu RAM estas konstruata baze de memoritaj propraj spertoj kaj baze de organizita edukado kaj instruado kiun ni ricevas de la socio. Kaj jen ĉi tie superrigardo de tiuj kampoj:

E-RAM

(KIAM EKZISTAS EKSTERA FORTO LA TUTAN KAMPON
REGAS LA SINGARDEMO)

**EDGK – singardemo pro ekstera danĝero
por grupo en kiu mi estas**

KAMPO: KREDO baze de nekompleta scio pri
grupfunkciado

METODO: statistika nombrado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
KOLEKTIVA DEFENDSCIENCO (Militista scienco),
GRUPA IDEOLOGIO (politiko)

EPGK – singardemo pro ekstera potenco aganta al mia grupo

KAMPO: KREDO baze de supozo pri grupfunkciado

METODO: analogiado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
FILOZOFIA IDEOLOGIO (historio, grupvaloroj),
RELIGIO

EDUK – singardemo pro ekstera danĝero por individuo

KAMPO: SCIO baze de mezurado

METODO: ekzakta mezurado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
EKZAKTAJ SCIENCOJ, DEFENDSCIENCOJ (pri individua defendo – sportoj)

EPUK – singardemo pro ekstera potenco, kiu agas al la individuo

KAMPO: SCIO baze de analogiaj konkludoj

METODO: analogiado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
JURO, FILOZOFIO

I-RAM

(KIAM NE EKZISTAS EKSTERA FORTO LA TUTAN KAMPON
REGAS LA **BEZONOJ**)

IDGK – bezonoj aparteni al grupoj

KAMPO: KREDO baze de nekompleta scio pri grupfunkciado

METODO: statistika nombrado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
PSIKOLOGIO (statistika),
SOCIOLOGIO (statistika)

IPGK – bezonoj pri regado super aliaj

KAMPO: KREDO baze de supozo pri grupfunkciado

METODO: analogiado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
SOCIOLOGIO (eksperimenta), ARTO (abstrakta)

IDUK – personaj bezonoj de individuo

KAMPO: SCIO baze de mezurado

METODO: mezurado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:
MEDICINO/PSIKOLOGIO (eksperimenta)

IPUK – bezonoj pri kreemo (sinregemo)

KAMPO: SCIO baze de analogiaj konkludoj

METODO: analogiado

EDUK-INSTRUAJ KAMPOJ:

ARTO (formala: filmo, proza literaturo, dizajno),
LOGIKO

8

KONKLUDOJ

Ĉi tiu verko enkondukas filozofiajn konsiderojn rilate la ekzaktan sciencon pri kibernetiko pro tio ke la kibernetiko studas ĉion elirante el la pozicio de subjekto. Tiusence jam en la bazo (la unuaj kvar niveloj, harmonikoj) ni vidas similecojn sed ankaŭ diferencojn rilate fizikon. Unua nivelo estas nivelo de EKZISTADO. Sekvas la demando de DIREKTO kio estas subjekta koncepto de la spaco. Por la subjekto ne gravas la teorio pri spaco, sed direkto al kiu direktiĝis ĉirkaŭaj subjektoj. La tria nivelo estas nivelo de INDIVIDUECO aŭ GRUPECO (la afero de egoismo kaj altruismo) kaj la kvara nivelo estas demando de RAPIDECO, kio korespondas al la TEMPO. Por la subjekto ne gravas la teorio de tempo, sed ĉu aliaj subjektoj ĉirkaŭ ĝi estas rapidaj aŭ ne.

Unue ni vidas ke ĉio funkcias laŭ diĝita (dueca) principo de disbranĉiĝoj kaj due ni vidas ke la baza kvarnivela procedaro baziĝas je du fizikaj konceptoj: la spaco (direkto) kaj tempo (rapideco) kaj je du filozofiaj konceptoj (ekzistado kaj socieco).

La kibernetiko estas difinita kiel scienco pri stirado. Stirado estas necesa nur se oni havas celon. Celo koincidas kun la senco. Kibernetiko esence diferenciiĝas de fiziko, ĉar ĝi konsideras la bazon de filozofio: la senco.

Fine iom pri la filozofia demando: ĉu homo estas plene determinita, ĉu do dio (aŭ naturo) metis ĉion (inkluzive homon) en staton kie regas absolutaj leĝoj kaj ĉio kio okazas estas laŭ tiuj leĝoj anticipe determinita, aŭ la homo (sekve ankaŭ aliaj estaĵoj) havas liberan volon kaj povas kondukti neantaŭvideble, kontraŭ la naturaj (aŭ diaj) leĝoj?

Mia respondo estas simpla: validas ambaŭ asertoj, sed ne samtempe. Ĉu ni kondutos komplete antaŭvideble (do laŭ leĝoj kiujn ni ne povas kontraŭstari) aŭ ni agos neantaŭvideble dependas de tio, ĉu en la disbranĉiĝaj demandoj niaj mezurinstrumentoj povas klare respondi la demandojn kaj senhezite decidi, ĉu la respondo estas jesa aŭ nea. Se al la demando: “Ĉu mia forto estas pli granda ol tiu de la atakanta kontraŭulo?” miaj mezurinstrumentoj povas senhezite respondi (ekzemple kiam evidentas ke iu estas multe malpli forta ol mi aŭ multe pli forta), kaj en la unua kazo mi certe klopodos fuĝi kaj en la dua mi certe klopodos venki en batalo – mi ne povas eviti konduti antaŭvideble), mi kondutas determinite. Sed se miaj mezursentumoj ne kapablas klare respondi (la kontraŭulo estas simile forta kiel mi, kaj mi ne povas kun certeco difini ĉu mi pli fortas aŭ li), en tia kazo eblas ke homo decidos ĝuste aŭ malĝuste (eble li decidos batali taksante tamen la kontraŭulon malpli forta kaj li venkos, ĉar li hazarde sukcesis taksi ĝuste, eble li malvenkos, ĉar li hazarde taksis malĝuste). En tiaj kazoj la homo povas erari, decidi malĝuste, kio signifas neantaŭvideble. Sekve, ĉio en la universo estas kaj determinita kaj nedeterminita. La konduto de ĉio dependas de tio ĉu en momentoj de disbranĉiĝaj demandoj, ties mezurinstrumentoj estas sufiĉe precizaj por povi ĝuste respondi. Se ili ne estas, kaj la precizeco de mezurinstrumentoj dependas de leĝo de ekonomieco, la respondoj kaj sekve reagoj povas esti malĝustaj, (malutilaj por la celo de la subjekto) kaj do nelogikaj kaj neantaŭvideblaj. Sekve la homo (sed ankaŭ ĉiu alia subjekto) havas sennombrajn ŝancojn por erare taksi kaj erare decidi, kio donas al li la kvaliton de neantaŭvideblo, de nedetermineblo.

Pri la skemoj de la konscia konduto (kvina, sesa, kaj sepa niveloj) mi povas diri ke ili estas nur provo difini la procedadon kiu okazas en la homo kiel la plej supera formo de la ekzistada evoluo. Nian manieron agi-reagi kaj ĝenerale konduti difinas sinsekvo de demandoj kaj respondoj en kampoj raciaj kaj neraciaj kiuj

estas akompanataj de diverstipaj sentoj, emocioj kaj pensaj formoj. Ŝajnas al mi ke mi sufiĉe logike difinis demandojn de la kvina kaj sesa nivelo kaj trovis korespondajn sentojn kaj emociojn kiuj akompanas koncernajn respondojn. Tamen, pri pluraj el ili mi ne plene certas kaj ili sendube devos esti reviziataj baze de diskutoj kaj esploroj de pluraj homoj. Ŝajnas al mi ke mi sufiĉe bone montris kiaj estas la reagoj mem je la kvina kaj sesa niveloj. Sed kompreneble, ekzistas pliaj niveloj. El ĉiu el reagoj oni povas elkonduki novan demandon (oka, naŭa... niveloj) kaj pluserĉi logikan disvolvon de la procedoj. Mi nur kiel ekzemplo diru, ke en la kampo IDUK – internaj fortoj agantaj al la subjekto mem estas difinitaj kiel korpaj bezonoj, do tre diversaj bezonoj kiel malsato, soifo, bezono feki, pisi, bezono pri sekso, spirado, diversspecaj doloroj kiel signoj de malsanoj, jukemo... Tiom multaj fenomenoj ne povas esti dissolvitaj je nur tri sekvaj harmonikoj (disbranĉiĝoj). Por veni al finaj branĉoj por ĉio tio, necesos difini plurajn pluajn harmonikojn. Sendube estas multaj aliaj sentoj kiuj karakterizas homojn en certaj situacioj kiel ekzemple ĵaluzo, dormemo, agrablo kaj malagrablo, konkuremo, posedemo, honto, venĝemo... kiujn mi ne trovis je la unuaj 7 niveloj... Tio restu tasko de la postaj esploroj de aliaj.

Gravas kompreni la bazan duecan karakteron en kiu daŭre ĉefan rolon havas reciproka interŝanĝado de racia kaj neracia konduto. En tio troviĝas la respondo al la sekreto pri tio, ĉu eblos produkti roboton kiu estos pli sukcesa kreaĵo ol la vivaj estaĵoj. Roboto estas kreata kiel rezulto de racia logiko. Ĝi estas farata kun certa celo baze de matematika racio. Neniu kapablas precize difini la neraciecon de vivestaĵoj, ilian emociecon kaj tiel nomatan “malsaĝan” konduton. Kiel programi “malsaĝecon”? Al roboto ĉiam mankos duono de la normala vivestaĵo – la neracieco.

LITERATURO

1. **Ashby, W. W. Ross:** Einfuehrung in die Kybernetik (Enkonduko al kibernetiko), An Introduction to Cybernetics, Chapman & Hall, 1956.
2. **Beran, Zdenek:** Importance of Language and Interlinguistics in the Information Society, Kibernetiko en Teorio kaj Praktiko, 7-a internacia kongreso TAKIS, Nitra 2002.
3. **Frank, Helmar:** Kibernetiko kaj interlingvistiko: Enkondukaj rimarkigoj, Kybernetische Paedagogik/Klerigkibernetiko, Schriften 1973-1992, Band 6, AIS San Marino 1993, p.303-310
4. **Frank, Helmar:** Kibernetike pedagogia teorio de la lingvoorientiga instruado, Kybernetische Paedagogik/Klerigkibernetiko, Schriften 1973-1992, Band 6, AIS San Marino 1993, 311-322
5. **Jaušovec, Norbert:** Kako uspešneje reševati probleme?, (Kiel pli sukcese solvadi problemojn?), Državna založba Slovenije, Ljubljana 1991.
6. **Maltz, Maxwell:** Psycho-Cybernetics, Prentice-Hall, 1960.
7. **Tišljar, Zlatko:** Kibernetika socio-psikologia modelo de homo, GRKG (Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft) Band 48, Heft 1, Maerz 2007.
8. **Tišljar, Zlatko:** Fundamentoj de gramatiko de Esperanto kiel modelo de universala gramatiko per analogie-kompara metodo (Lingvistika simpozio, Kumrovec 1975), Internacia Kultura Servo, Zagreb 1976.
9. **Wiener, Norbert:** Kibernetika i društvo (Kibernetiko kaj la socio), The human use of human beings – cybernetics and society, Houghton Mifflin Company, 1950; Anchor Books, 1954.

BIOGRAFIO DE LA AŬTORO

Naskiĝis la 19-an de majo 1945 en Zagrebo, Kroatio kaj esperantistiĝis en 1962 en Studenta Esperanto-klubo en Zagrebo. Li gvidis pli ol 150 E-kursojn.

Prezidanto de Jugoslavia Junulara Esperantista Asocio de 1968-1977 kaj membro de komitato de TEJO. En 1972 li iniciatis kaj fondis entreprenon Interancia Kultura Servo en Zagrebo, kiun li direktoris ĝis 1991. IKS evoluis al entrepreno kun 10 enpostenigitoj kun signifa eldona agado (ĉiujare 3-5 libroj), kun ĉiujara profesia pupteatra internacia festivalo (PIF), kun organizado de sciencaj simpozioj, teatraj festivaloj, seminarioj. Ĝi evoluigis ankaŭ la Zagreban Metodon instrui Esperanton kies lernolibro aperis jam en 35 lingvoj. Li estis membro de UEA-komitato de 1979 ĝis 1998. Ekde 1992 li loĝas en Maribor (Slovenio), kie li fondis entreprenon Inter-kulturo, kiu interalie organizis SAT-kongreson, REFon, Alpadrian konferencon, sciencajn simpoziojn, tribunojn, festivalojn (2 Pupteatrajn festivalojn en Klagenfurt kaj iniciatis la festivalon La Strada en Graz en kiu li organizis ankaŭ internacian simpozion "Internacia familio – utopio aŭ realeco" en 1994) kaj eldonis pli ol 20 librojn. Li iniciatis fondon de Asocio por Eŭropa Konscio en 1996 kies sekretario li estas ankoraŭ nun. De 2001 ĝis 2009, kiam li emeritiĝis, li laboris en Popoluniversitato de Maribor kaj okupiĝis pri eŭropaj projektoj en edukado.

En 2000 li fondis Societon por Eŭropa Konscio en Zagrebo. Ekde 2005 li estas sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj en 2007 prezidanto de organiza komitato de la 7a EEU-kongreso en Maribor, redaktoro de Europa Bulteno de 2009.

Li tradukis kelkajn romanojn kaj novelarojn el la kroata kaj slovena literaturoj al Esperanto. (el la slovena »Mi volis tuŝi la sunon« de Tone Partljič).

Li abiturientiĝis en elektroteknika gimnazio de Zagrebo kaj unue laboris en Scienca instituto Ruđer Bošković en Zagrebo. Poste li studis ĉe la Filozofia Fakultato en Zagrebo germanan lingvon, humanisman informadikon kaj ĝeneralan lingvistikon kaj poste ĉe Internacia Akademio de Sciencoj San Marino (AIS) kibernetikan pedagogion (li magistriĝis per diplomlaboro pri propedeŭtika valoro de Esperanto).

Liaj ĉefaj originalaj verkoj estas “Eŭropa ideologio”, “Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj”, “Duobla spiralo” kaj “Eŭropo, vi baldaŭ mortos”. Li verkis ankaŭ lernolibrojn (ĉefaŭtoris la bazan lernolibron laŭ la Zagreba Metodo), verkis Instruclaron por uzantoj de tiu metodo, B-lernolibron kaj du vortarojn (espertanto-kroatan kaj esperanto-slovenan).

Li multe vojaĝis kaj prelegis pri esperantaj kaj eŭropaj temoj. Liaj sciencaj verkoj aperis en deko da simpoziaj kolektoj kaj ankaŭ multaj artikoloj en diversaj E-gazetoj, plej multe en Monato kaj Eŭropa Bulteno.

Li konstante okupiĝis ankaŭ pri scienca laboro kaj partoprenis en dudeko da sciencaj simpozioj en kiuj li prelegis pri temoj el pedagogio, kibernetiko, lingvistiko. Aperis trideko da liaj sciencaj artikoloj en diversaj librokolektoj kaj en sciencaj revuoj ĉefe en Esperanto sed ankaŭ en la kroata, germana kaj la slovena lingvoj.

ENHAVO

1. Pri kibernetikaj principoj kaj metodoj kaj pri lingvistiko	5
2. Bazaj nocioj	13
3. La baza 4-nivela skemo	29
4. Pliaj niveloj.	59
5. Vivekzemploj	59
6. Kromaj principoj	65
7. Kiel sistemigi la mondon.	67
8. Konkludoj	71
Literaturo	75
Biografio de la aŭtoro.	77